

1974 oktobro

67-a jaro

n-ro 826 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Vi trovos

ke ĉi tiu numero de la revuo estas jam tute “normala”, sen multaj memorigoj pri la hamburga tertremo, kun la kutimaj varieco kaj rubrikoj. Kelkloke en ĉi tiu numero vi flaros, ke la hamburgaj eventoj ankoraŭ provokas ondetojn, sed jam nun estas tute klare, ke ŝippereiga uragano nek okazas, nek okazos, kio devus seniluziige efiki ĉe kelkiuj, kies deziro kaj strebo tio estis, kies valora laborenergio tiucele fordiboĉiĝis post la 59a Universala Kongreso.

Vi espereble rimarkos esencan trajton de ĉi tiu numero de nia revuo, kompare kun la plimulto de la ĉi-jaraj numeroj: Ne tumultas artikoloj de la estraranoj, kies kontribuojn ni komencas mezuri per la sama metro, uzata ankaŭ por la aliaj kontribuantoj al la revuo. Ni tiamaniere emas preventi, ke la revuo refariĝu afiŝtabulo nur de la Estraro aŭ de unu homo en ĝi, kio en la pasinteco ofte okazis kaj estis rekta atenco al la senpartieco kaj interese de la revuo, kiu, kiel ĉiuj periodaĵoj celantaj vastan legantaron, esence vivas ĝuste de tio.

Enhavo

- 161 Denove pri Hamburgo: Alidirekta leciono (sm)
- 162 Kvar belaj donacoj (E.J. Woessink), Nova vento
- 163 Radio — televido — gazetaro: Kiel reeĥis la Kongreso? Seriozeco dependas de ni
- 165 Prunteprenita komento: Ne temas pri aviadiloj (Basil Boothroyd)
- 166 Publika letero al la eŭropa esperantistaro: Grava iniciato restis senĉefa, Alvoko el Hindio
- 167 Kongreso de SAT: Kontaktoj kun sindikato (E. Borsboom)
- 168 La 60a Universala Kongreso de Esperanto: Kopenhago triafoje
- 170 Kongresa komuniko (Unuaj novaĵoj pri la 60a UK)
- 171 TEJO-paĝo: Laborprogramo de TEJO: Kion oni faros?, Ŝrumpo, 31a IJK, La skolta nodo
- 172 Sub noktomeza suno, Stampedo
- 173 Recenzoj (“Esperanta-rusa vortaro”, “Nova geografio”, “Ni laboru kaj esperu!”, “Kalejdoskopaj varietoj”, “Elementa ekologio”)
- 175 Laste aperis..., Antaŭ 50 jaroj
- 176 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 178 Oficiala informilo
- 179 Kotiztabelo por 1975, Anoncetoj
- 180 Esperanto en radio (kompleta tabelo)

La kovrilo

La dana ĉefurbo notis dum la lasta jardeko nekredeblan altiĝon de siaj mencioj en la monda gazetaro; ĝi subite fariĝis unu el la mondaj kaj mondumaj metropoloj. Eble al tio grave kontribuis la subita malprudiĝo de la danoj kaj liberalisma traktado de kelkaj, cetere tiklaj, temoj de la homa vivo. Ĉiukaze, Kopenhago multe ŝanĝiĝis kaj daŭre ŝanĝiĝas. En novembro 1962, “Strøget” (sur la kovrila foto), strato en la koro de la urbo, estis fermita por la trafiko kaj tiel fariĝis la plej longa piedira regno por Eŭropo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: S. Milojević.

Inkluzivas la organon de TEJO “La Juna Vivo” (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA)

Estrararo de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne, PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germ., tel. (040) 7 38 45 08.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegujo; tel. (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B 3581 Achel, Belgio; tel. (011) 64 31 50.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B 4000 Liège, Belgio; tel. (041) 27 00 79.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino Flora Szabó-Felső, Várady A.út., H-7621 Pécs, Hungario.


Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m. 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 74 12.

Alidirekta leciono

EBLE IU ALIA foje esploras, kiu registara reprezentanto, ne estante mem esperantisto, estis la unua diplomato, kiu alparolis Esperanto-kunvenon en la Internacia Lingvo. Ĉiukaze, post la 55a UK, en 1970 en Vieno, kie tion faris ses diplomatoj, oni komencis ĉiampli kaj pli ofte utiligi tiun plej facilan manieron elvoki entuziasman aklamon de esperantistoj. Ankaŭ en Hamburgo, ĉi-jare, pluraj diplomatoj salutis la Kongreson en la Internacia Lingvo.

Oni ofte inklinas kredi, ke almenaŭ unuavide temas nur pri sukcesa reklamtruko, pri altgrada ĝentileco, kiu cetere estas konsista parto de la diplomata metio. Efektive, se iu aŭ pluraj el la kutime poliglota diplomatoj prenas unuhoran prononclectionon, kun celo akcepteble — aŭ preskaŭ perfekte kiel faris la israela reprezentanto en Hamburgo — elparoli siajn salutvortojn, tio ja estas simpatia, ĉarma, bela, ĝentila gesto, sed ĝi certe ne viciĝas inter gravajn atingojn de la Esperanto-movado.



La graveco de la alidirekta leciono: S-ro Ernle Money parolas en Hamburgo. (Maldekstre staras s-ro G. Leon-Smith, prezidanto de BEA).

Tamen, ĉu ni ne subtaksas tiaspecajn eventojn? Ĉu la ĝentilaj diplomatoj ofte mem ne donas pli da graveco al siaj elpaŝoj, ol ni tion pretas fari? Ĉu estas juste kaj ĝuste, de jaro al jaro tiel preteratentadi la ĉiam kreskantan nombron de diplomatoj, kiuj ne nur pretas leviĝi dimanĉe frumatene (kiam okazas la inaŭguroj de niaj kongresoj), sed ankaŭ konatiĝi kun la Internacia Lingvo, almenaŭ ĝis tiu grado, ke ili sukcesas elparoli ĝiajn vortojn? Parolante pli ĝenerale, ĉu la aliaj, almenaŭ kelkfoje, ne konsideras nian Movadon esti pli serioza, ol ni mem tion pri ĝi

imagas? Unu el tiaspecaj eventoj en la kadro de la 59a UK en Hamburgo, postulas, ke ni revenu al ĝi. S-ro Ernle Money, membro de la Brita Parlamento, opozicia ministro pri kulturo, faris specialan vojaĝon de Londono al Hamburgo, kun la sola celo alparoli la 1650 kongresanojn el 50 diversaj landoj. Jen fragmento de lia parolado.

“Mi estas politikisto kaj mi forte opinias, ke la vera demokratio dependas de la homoj kaj de ilia kapablo interkompreniĝi. En la ege kompleksa mondo, en kiu ni vivas, fronte al ĉiam pli kompleksaj problemoj, nun gravas pli ol kiam ajn antaŭe, ke ni komprenu unu la alian sur individua bazo, kaj ne nur per formaj politikaj kanaloj.

Vojaĝado nun fariĝis tiel facila kaj rapida, ke ĉie prezentiĝas la okazo komuniki kun alilandanoj: sed ankoraŭ trala tuta mondo ni suferas pro la malbeno de la Turo Babela. Ĉiu, kiu partoprenis diskutojn sur internacia nivelo, bone scias kiel malfacile estas ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ĉe Unesko, ĉe la Konsilantaro de Eŭropo, ĉe la Eŭropa Parlamento aŭ ĉe profesiaj aŭ komercaj konferencoj, kiel malfacile estas atingi spontan, precizan kaj sinceran interkompreniĝon anstataŭ la kutima oficiala, preparita, pompaĉa duonkompreniĝo pere de la tradukistoj.

Tiu, kiu malbone parolas fremdajn lingvojn — kiel mi ekzemple — scias, kiel kore oni deziras libere paroli kaj vere amikiĝi kun alilandanoj. Bedaŭrinde, tiu deziro ofte malaperis sub amaso da neprononceblaj vortoj kaj nekompreneblaj frazoj. Tial mi persone kredas, ke Esperanto estas necesa por la estonteco de ni ĉiuj, — necesa, ĉar Esperanto antaŭenigos la pacon, — necesa, ĉar Esperanto estas vera bazo por individua amikeco, — kaj necesa, ĉar nur Esperanto ebligas al venontaj generacioj lerni lingvon taŭgan por ĉiuj, lingvon, kiu forprenas la privilegion de la lingva elito.

... Mi deziras, ke la parlamentanoj en ĉiuj landoj konsciigu pri la granda valoro de Esperanto. Mi deziras, ke vi ĉiuj kontaktu viajn parlamentanojn kaj, ke vi persvadu ilin subteni la instruadon de Esperanto en la lernejoj, ĉar tio estas la sola maniero per kiu ni povas solvi la lingvan problemon.”

La parolado de s-ro Ernle Money, kiu estas unu el la sekretarioj de la 46-membra Esperanta Parlamenta Grupo en Britio, estis eldirita en la Internacia Lingvo aŭ, ni tamen notu tion, en lingvo, kiu ĝis la grado de komprenebleco similis al Esperanto. Malgraŭ evidentaj klopodoj kaj spite al tio, ke la prezidanto de Brita Esperanto-Asocio apudstaris kaj rolis kiel sufloro, la fonetika kvalito de la parolado de s-ro Money estis

preskaŭ katastrofa. Ankaŭ enhave s-ro Money ne diris al ni ion novan. Tamen, ni ne skribas ĉi tiujn liniojn por malafabli al la brita parlamentano, ĉi tiu komento havas tute malan celon.

Se parlamentano de lando, kiu ja estas grandpotenco, se denaska parolanto de lingvo, kiu — ni ne traktu kialojn ĉi tie — efektive rolas kiel internacia ĉefkomunikilo, faras specialan vojaĝon por dum kelkaj minutoj balbute alparoli kongreson de esperantistoj, — tio estas senprecedence brava paŝo de s-ro Ernle Money, pli kuraĝa kaj pli admirinda ĝuste pro la aluditaj mankoj en lia esperantlingva esprimpovo. Tio estas aŭdaca cede, grava rekono kaj respektinda konduto. La fakto, ke s-ro Money ne diris al ni ion novan, sed reeĥis ĝuste tion, kion la Esperanto-movado dum jardekoj klopodas diri al la mondo, — tio, tiu alidirekta leciono, estas almenaŭ parto de nia celo konsciigi aliajn pri la lingva problemo, plia rekono de la seriozeco de niaj argumentoj kaj nia solvo. Ĉar ni ne malofte kapablas ludi per tiu seriozeco, ĝuste nun kiam aliaj komencas respekti ĝin, la alidirekta leciono de la brita konservativa politikisto al la progresema Esperanto-movado (Ho, kiel la epitetoj relativas!) estis ne nur respektinda, sed ankaŭ ĝustatempa kaj necesa.

sm



La nova teamo ekagis: D-ro H.R. Tonkin, prezidanto, kaj s-ro E.L.M. Wensing, ĝenerala sekretario de UEA.

Nova vento

ESTAS IOM FRUE eĉ serĉi notindajn rezultojn en la dumonata laboro de la novaj Komitato kaj Estraro de UEA. Al tia starpunkto ŝuldiĝas ankaŭ la avareco de la spaco, kiun la revuo ĉi-foje disponigas al tiu laboro. Tamen, almenaŭ unu afero jam nun ŝajnas esti tute klara: la nova Estraro okupiĝas pri novaj iniciatoj kaj sukcesis enarkivigi plurajn el tiuj "demandoj", kiuj antaŭe perdis tempon al la organoj de la Asocio. (Tion kun plezuro faras ankaŭ nia revuo). Provizore, la aktivecon de la novaj organoj de UEA ni ilustru per jeno:

Inter la unuaj problemoj, kiujn frontis la nova Estraro, estis la sanigo de la financa situacio. Fine de septembro, la Komitato per skriba voĉdono akceptis per granda plimulto (36 kontraŭ 2, kun 1 sindeteno) la buĝeton por 1975, ellaboritan post la UK. La ĉefaj trajtoj de tiu buĝeto estas unuflanke la drastaj ŝparoj (parte jam efektivigataj), aliflanke ĝenerala altiĝo de la kotizoj. Neniu volonte proponas kotizaltigojn. Tamen la voĉdono de la Komitato klare montras, ke ĝi plene komprenas kaj aprezas la gravecon de la ŝparoj, la konstantan minacon de la kreskanta inflacio kaj la seriozecon de la jam ellaboritaj planoj por havigo de novaj financaj rimedoj. Ĝenerale, la kotizoj por la nova jaro estas altigitaj (en guldenoj) je 25%. (Detala kotizotabelo aperas sur la paĝo 179). La kotizoj en aliaj valutoj estas kalkulitaj tiel, ke laŭeble — tiel decidis la Komitato en Hamburgo — ili variu de lando al lando depende de la ekonomiaj kondiĉoj, forteco aŭ malforteco de la landa valuto kaj similaj konsideroj. Escepto en la listo de altigoj estas la kategorio "Membro-Subtenanto". La nova, konsiderinde pli alta kotizo de MS respondas al nova koncepto pri tiu kategorio. La personoj, kiuj pretos grave subteni la Asocion per kotizo egala al 3 kotizoj de Membro-Abonanto, estonte estos registritaj kiel membroj ankaŭ de nova "Societo Zamenhof", en kiun eniros ankaŭ honoraj membroj kaj patronoj de UEA. Dum ĉiu Universala Kongreso okazos aparta akcepto fare de la prezidanto de UEA por tiuj membroj.

Kvar belaj donacoj

ĈIU MEMBRO, kiu sekvas la financon flankon de la UEA-agado, scias, ke en la nuna tempo, kun la ĉiam kreskantaj kostoj, estas malfacilege ekvilibrigi la en- kaj elspezojn, eĉ farante drastajn ŝparojn de la elspezoj. Pro tio estas aparte ĝojiga novaĵo, ke kelkaj membroj decidis per siaj donacoj antaŭenigi la agadon de UEA kaj helpi, ke la nuna financa krizo estu pli facile venkita. Post la 59a UK en Hamburgo, la Centran Oficejon atingis tri donacoj de po 1 000,— guldenoj. La malavaraj donacintoj estas: s-ro Erik Carlén (Svedio), s-ro Felix Epstein (FR Germanio) kaj juna svedino, kiu ne deziris publikan mencion de ŝia nomo. Krome, dum la sama periodo, s-ino H.R. de Sonnenfeld (Urugvajo), plenumante deziron de sia forpasinta edzo, akademiano Ernesto Sonnenfeld (v. nian revuon, marto ĉ.j., p. 59), sendis donace al UEA du ĉekojn en suma valoro de ĉ. 2 700,— guldenoj.

Tutkoran dankon al tiuj kvar membroj de UEA!

E.J. Woessink,
estrarano pri financo

Seriozeco dependas de ni

Iun tagon, en la daŭro de la kongresa semajno en Hamburgo, sur la afiŝtabulo en la akceptejo, aperis longa pardonpeto pro la foresto de la Esperantaj bultenoj de la Kongresa Gazetara Servo. La titolo de tiu klarigo tekstis proksimume jene: “Ĵurnalistoj grave malhelpas la funkciadon de KGS”. Feliĉe, ne temis pri sukcesa ŝerco de petolemulo, sed pri la vera stato de la labor-kondiĉoj en KGS, kiu dum la tuta semajno estis senĉese sieĝata de germanaj raportistoj kaj intervjuantoj. Tamen, la bona reeĥo de la Kongreso en la nacilingvaj amaskomunikiloj ne ŝuldiĝas nur al la dumkongresa funkciado de KGS, sed grandparte, kaj eble eĉ ĉefe, al la faritaj preparlaboroj, kiuj ĉi-foje estis aparte seriozaj kaj sukcesaj.

LA 59a UNIVERSALA KONGRESO – la unua en FR Germanio de post 16 jaroj – vekis konsiderindan atenton ĉe la en- kaj eksterlandaj amaskomunikiloj. Post okazaj notoj, precipe en la hamburga gazetaro, meze de julio komencis aperadi pluraj, parte tre ampleksaj artikoloj pri la okazonta kongresa evento, i.a. sur la tria pripolitika paĝo de *Süddeutsche Zeitung* (17-7), en la tutlanda *Die Welt* (24-7) kaj en *Handelsblatt* (26-7). En la plej grava semajna gazeto *Die Zeit* (26-7) aperis artikolo de prof. Helmar Frank pri la eksperimenta instruado de Esperanto en lernejoj; tiu artikolo servis poste, kiel ni povis konstati, al aliaj ĵurnalistoj kiel unua informfonto.

Granda interesiĝo de ĵurnalistoj

Verŝajne senprecedence multnombran partoprenon (de entute 22 ĵurnalistoj) spertis la Gazetara Konferenco, la 26an de julio. Post ĉ. unuhora daŭro, la prezidantaro de la Konferenco (prof. Lapenna, ges-roj Bormann, G. Becker kaj U. Lins) estis intervjuita de la radiostacio *Deutschlandfunk*; la elsendo (ĉ.10 min.) okazis la 3an de aŭgusto. Vendredon kaj sabaton posttagmeze kaj vespere preskaŭ ĉiuj regionaj radio-stacioj en FR Germanio kaj okcidenta Berlino disaŭdigis, en la kadro de vort-muzikaj programoj, rektajn intervjuojn kun kongresaj funkciuloj (el tiuj 6 kun d-ro Bormann); ankaŭ Esperantaj kanzonoj estis elsenditaj. La 26an vespere d-ro Bormann aperis en nordgermana televida programo por ĉ. 7-minuta intervjuo. La 27an posttagmeze H. Behrmann aŭdigis sin, en porjunulara radio-programo, pri “Esperanto programita” kaj lernejoj eksperimentoj, kaj la 29an vespere prof. Frank dum dek minutoj raportis siajn spertojn pri Esperanto en prikultura elsendo de Sarlanda Radio. Scenojn el la Inaŭguro prezentis, dimanĉon vespere, la novaĵ-magazino de Dua Germana Televido (tutlande videbla). Televidaj spektantoj en norda Germanio povis rigardi la 2an de aŭgusto kelkminutan mikspoton el la Kongresejo: esperantlingvan anoncon de la pola aktorino Kalina Pieńkiewicz, la Kvarteton Esperanto, intervjuon kun IFEF-prezidanto Giessner, BEA-prezidanto Leon-Smith kaj eksministro Choi kaj scenojn el

La Barbiro de Seviljo. Fine de la Kongreso, la 3an de aŭgusto, en aktuala felietono de la radiostacioj Kolonjo kaj Hamburgo, d-ro Bormann informis pri la politikaj aspektoj de la UK. Statistike eĉ ne registreblaj estas la mencioj de la Kongreso en la kadro de ordinaraĵ novaj-elsendoj en radio kaj televido.

Pri la reeĥo en eksterlando ni ne ricevis ĝis nun multajn informojn, sed anglaj gazetoj jam raportis antaŭ la UK, kaj komunikojn dissendis i.a. la agentejoj AP kaj Reuter. En la krakova gazeto *Dziennik Polski* aperis ampleksa intervjuo kun UEA-estrarano S. Świs-tak pri Hamburgo kaj la estonta laboro de UEA. Ankaŭ la historion de la Universalaj Kongresoj prituŝas longa raporto en la ĉefa bulgara gazeto *Rabotniĉesko Delo*. Tamen, la informadon al eksterlando prizorgis ankaŭ la radiostacioj *Deutschlandfunk* kaj *Deutsche Welle*: Iliaj raportistoj surbendigis intervjuojn kun kongresanoj el ĉ. 15 landoj en iliaj respektivaj lingvoj, por dissendado tra la mondo, i.a. al Japanio. Unu el la raportistoj laŭdis la originalecon kaj variecon de la starpunktoj prezentitaj en la intervjuoj.

Oni emas tikli la senzon pri kuriozaĵoj

La sintenon de la ĵurnalistoj en la Gazetara Konferenco oni povas karakterizi kiel pozitivan. La intervjuoj en radio kaj televido povis prezenti la temon je la avantaĝo de la demanditoj, kaj la plimulto de la gazet-artikoloj estis objektivaj verkita, pluraj kun favora tendenco; multaj aperis sur la kulturaj paĝoj, kio en FR Germanio ne estis oftaĵo en la pasinteco. Entute, pro informada vakuo rilate Esperanton, estiĝinta en tiu lando dum la lastaj jaroj, estis neeviteble, ke ĵurnalistoj ofte opiniis necese ekspliki al la legantoj aŭ aŭskultantoj difinitajn trajtojn de la lingvo kaj Movado, anstataŭ unuavice informi pri la celo kaj enhavo de la Kongreso. Plue, ili emis tikli la legantaron senzon pri kuriozaĵoj: Almenaŭ tri gazetoj raportis sub la esperantlingva titolo “En Hamburgo estas la noktoj longaj” (alude al konata kanzono), oni kvazaŭe dementis, ke “kio, kie, kiam” estas birdosonoj, kaj semajna gazeto donis al intervjuo kun s-ino Bormann

la titolon “Familio kun sekreta lingvo”. Aliflanke, ankaŭ la prikongresa raportado, en kiu troe emfaziĝas prelegoj pri kanarioj aŭ drontoj, ne ĉiam adekvate respegulas la duoblan karakteron de la UK, la laboran (priesperantan) kaj kulturan-sciencan (peresperantan), anstataŭe donante la impreson, ke la programo estas iom nekohera oferto de neĉefaĵoj.

Objektiva kaj serioza raporto en la renoma, tutlande legata “Die Welt”

Veki simpatie por la Esperanto-movado — tion konfirmas la spertoj de la Gazetara Servo en Hamburgo — ne estas malfacile, sed tute alia problemo estas kiel malhelpi la konkludon de legantoj, ke Esperanto estas esotera afero, t.e. kiel atingi, ke la amaskomunikiloj priatentu la Kongreson kiel kulturan manifestacion, ne simple kiel grandan familian feston de ĉarmaj, sed iom ekstermodaj personoj. Ke tio ja estis atingebla, montras la raporto pri la UK sur la kultura paĝo de la renoma, tutlande legata *Die Welt* (1-8) — modelo de objektiva, serioza artikolo. Ĝi tute forlasas la kadron de felietoneca traktado de pli-malpli akcesoraj aspektoj de Esperanto: Unue, ĝi rekte eniras la demandon, kiu kutime eĉ ĉe bonvolaj juĝantoj, provokas plej multe da skeptiko — nome la ŝancojn de Esperanto esti agnoskita kiel internacia laborlingvo. La aŭtoro trafe atentigas pri la malharmonio inter la elokventaj simpatideklaroj de eminentuloj, unuflanke, kaj la rimarkeblaj sukcesoj de la esperantistoj pri oficialigo de ilia lingvo, aliflanke. Korekte citita estas la tezo de prof. Lapenna, ke Esperanto povas efiki pacige inter “kultura-lingva imperiismo” kaj la rajto de pli malgrandaj nacioj konservi sian nacian identecon. Estas malprave — laŭ la artikolo — konsideri la esperantistojn sektecaj, kaj estas eksterdube, ke Esperanto iĝis utila komunikilo: tio ĉi, ĉiam denove supozata kaj propagandata, nun iĝis ankaŭ science kontrolebla, nome per la lernejoj eksperimentoj en 5 landoj, kiuj montris, kiom pli facile lernebla estas la lingvo. Tiuj eksperimentoj apartenas, kiel plue skribas la aŭtoro, al la “taktiko de etaj paŝoj”, kiu estas promesplena vojo al atingo de la fina celo. Fine, la verkinto registras, ke la esperantistoj nek ignoras la eksteran mondon kun ĝiaj potencpolitikaj kaj ideologiaj antagonismoj, nek simple dediĉas sin al mondunuiga entuziasmo, kio ŝajnas al li pruvo por realisma taksado de la rolo de Esperanto fare de ĝiaj adeptoj, ne kredantoj je ia “magia forto” de sia lingvo.

Zorge antaŭprepari informan materialon

La fakto, ke tiu artikolo vaste ĉerpis el germanlingva materialo speciale kompilita por la Gazetara Konferenco, samtempe substrekas la gravecon, kiun oni plue devos atribui al tiaspecaj preparlaboroj, ĉar la scivolon de ĵurnalistoj (nature ĉe UK) necesas kontentigi ne nur per buŝaj informoj, sed ankaŭ per zorge ellaborita skriba materialo. La leciono, kiun instruis la publika reeĥo pri la Hamburga Kongreso, certe ne estas aplikebla por ĉiuj aliaj landoj, ekz. ne tie, kie okazis



Malproksimaj gastoj en la kongresa urbo vekas la intereson de ĵurnalistoj, eĉ sen aparta atentigo.

pli efika informado pri Esperanto antaŭe. Sed tri ĉefaj konkludoj kristaliĝis kiel aparte priatentindaj: — Necesos doni pli da zorgoj al la serioza informado pri la UK mem, ekz. pri ĝia aktuala ĉeftemo, kaj laŭpove evitigi la impreson, ke la esperantistoj iom senkriterie disĵetis siajn interesiĝojn al flankaj temoj. Ĉiuokaze, necesos nepre konservi la relative altan nivelon de la Kongresoj kaj ne mallevi ĝin pro erara konceptado de ia prefero de ĵurnalistoj raporti pri la pli familiecaj aspektoj de la esperantista renkontiĝado. — Ofte mankas bazaj scioj pri la lingva problemo en la mondo. Kelkaj artikoloj povus, almenaŭ ĉe nesufiĉe informitaj legantoj, estigi la impreson, kvazaŭ la esperantistoj iom troigas pri la akreco de lingvaj problemoj kaj kvazaŭ Esperanto celas konkurenci kun la ĉefaj mondaj lingvoj, anstataŭ esti saĝa alternativo kontraŭ la plimultiĝado de oficialaj kaj laboraj lingvoj.

— Ĉar skeptiko pri la ŝancoj de Esperanto kaj pri la malpotenco de ĝia adeptaro trapenetras eĉ la pli simpatiajn gazetartikolojn kaj radiokomentojn, estas tre grave ellabori intelligentan respondon al la centra demando, kiel la esperantistoj imagas atingi siajn celojn kaj kiujn praktikajn paŝojn ili entreprenas por tio. Montriĝis tute klare, ke sukcesaj rezultoj de lernejoj eksperimentoj konsiderinde impresas ĵurnalistojn, ĉiuokaze multe pli ol la subtenaj vortoj de eminentuloj. Plie, kiam temas pri la prijuĝado de la mondpolitika scenejo, sur kiu Esperanto deziras avanci, ni devos nin establi antaŭ la publiko kiel, ja, idealistoj, sed kiel homoj provizitaj per tiu nerezignebla dozo de realismo, kiu sola ebligas alproksimiĝon al idealo kaj kiun, post *Le Figaro* pasintjare, nun rekonis ankaŭ grava germana gazeto.

Receptoj por spektaklaj rezultoj ne ekzistas, sed Hamburgo konfirmis, ke la seriozeco de nia celo povas, per daŭre pliefikigenda informado, trovi en la amaskomunikiloj tiun seriozan resonon, kiun ĝi meritas.

Ne temas pri aviadiloj

Basil Boothroyd estas konata ĵurnalista plumo en Britio, sed almenaŭ al ni ne estas konate, ke li iam pli frue okupiĝis pri la monda lingvo - problemo. Lia teksto, kiun ni represas ĉi tie, aperis la 8an de aŭgusto 1974, en la prestiĝa jurista revuo "New Law Journal", kiu aperas en Londono. Ni ne povas certi, ĉu Basil Boothroyd serioze studis la problemaron de la "monda miskompreniĝo", kiel li mem dirus, kaj ĉu li tute hazarde, en la fino de ĉi tiu teksto, mencias Esperanton. Tamen, hazardo aŭ ne, ni trovis la tekston modelo de efika kaj bone argumentita pledo por la Internacia Lingvo.

MI ESTAS NENIA d-ro Kissinger aŭ s-ro Nastase. Do, mi verŝajne neniam devos senpaŭze trafumi sepon da landoj, sen iu momento por hejme kapti la ĝustan frazlibreton.

Se tio tamen okazus, mi verŝajne savus min per mia sola frazlibro, kiu donas tradukojn al la franca, germana, hispana, itala, portugala kaj sveda lingvoj. Sufiĉe saĝe, sed senesperige, la unua frazo instruas diri "Mi ne komprenas" en la franca, germana, hispana, itala, ktp.

Eble iun tian kaŭzon havis la konfuzo, okazinta kiam Britio kaj Francio kredis, ke ili sukcesis vendi tri aviadilojn "Concorde" al la ŝaho de Irano. Oni memoru la diraĵon de la franca prezidento, ke la ŝaho certe aĉetos; la prezidento tion komunikis al la gazetaro, kiu jubile anoncis "CONCORDE SAVITA", en minimume du lingvoj. La francoj eĉ regalis lin per festveturo reen al Teherano per Concorde, por montri per tiu iom pli ol duhora flugo, ke li saĝe aĉetis. Aviadilteknikistoj ambaŭflanke de la Manika Markolo ĉielenĵetis la ĉapelojn (hats/chapeaux), kiuj tamen ŝrumpe refalis, ĉar poste montriĝis, ke la ŝaho diris, ne, ke li definitivigas siajn opciojn, sed nur, ke li plue ilin tenos, aŭ respektos, aŭ kion cetere oni faras ĉe opcioj.

La internacia miskompreniĝo

Ne estas malfacile diveni, kiel estiĝis tiu miskompreno. Eĉ se la ŝaho bone parolas la francan, oni tamen facile iomete misdiras inter, ni diru, la pladoj de luksa oficiala bankedo. Sed, laŭ mi, vizitanta ŝtatestro rajtas ĉiuokaze konversacii per sia propra lingvo, kaj lasi al la gastiganto la traduklaboron. Verŝajne okazis, ke la ŝaho tute bone esprimis sian penson, sed la franca prezidento ne sufiĉe antaŭekzercis la persan lingvon, kaj, jen pro influo de la propra deziro, jen pro unu kaj alia aferoj, li surkapigis la sencon de la diraĵo.

Aŭ eble la fatala eraro okazis poste, dum la gazetarkonferenco. Mi scivolas, per kiu lingvo oni donis tiun ĝojan informon al la kunveno de diverslingvaj raportistoj. Eĉ se ĉeestis interpretistoj, mi honeste ne povas esprimi roke firman fidon al tiuj sinjoroj. Per momenta koncentriĝoperdo oni povas enmeti aŭ ellasi ĝuste

tiun vorton, kiu faras "toute la différence", se oni tiel france diras, la krizan diferencon, ĉu en la angla, franca, persa, hispana, portugala aŭ iu alia el la lingvoj, kiujn la homaro disdiferencigis por profundigi la internacian miskompreniĝon.

Estas efektive mistera, eĉ absurda, tiu tutmonda nekomunikeblo; absurdaĵo kiun mi aparte forte rimarkas transflugante de Lydd, en suda Anglio, al Le Touquet, en Francio. Veturo ne pli ol 20-minuta, eĉ en praa aviadilo. Apenaŭ tempo sufiĉa por trovi la alian finon de la sekurekrimeno. Kaj, jen oni eliras en flughavenon, plenan de homoj, kiuj komprenas nenion onian vorton. Stulte!

Ĉu "tre bele" sufiĉas?

Foje en sendorma nokto, mi demandas min, kiel s-ro Nixon parolas la rusan; kaj kiel s-ro Breĵnev la usonan. (Cetere jes usonan, ne anglan. Ne estas la sama afero. Por usonano poŝkesto estas "mail drop", por anglo "pillar box"; valizetikedo estas por usonano "shipping tag" sed por anglo "luggage label"; kaj tiel plu). Kiam s-ro N., vizitante Moskvon antaŭ kelkaj semajnoj, eliris la aŭton por iom moviĝi inter la homoj, li povis en la rusa diri nur "tre bele". Konsola penso, konsentite, ke kiam li kaj s-ro B. babilas per la "ruĝa linio", ili povas daŭre ripetadi "tre bele". Sed ĉu tio sufiĉas? Se ekzemple necesus interkonsenti pri vivograva afereto kaj ili disponus nur pri la konataj kvar minutoj? Estis al mi plaĉe, aŭ eble nur flate, konstati, ke la turka ĉefministro anglalingve alparolis la ĵurnalistojn pri Cipro. Brave. Sed ĉu laŭ vi, leganto, s-ro Callaghan bone regas la turkan? Povas esti, ke eventuale ĉeestantaj grekaj raportistoj sentus nek plaĉon nek flaton, sed pli ĝuste konfuzon. Ĉar la greka vorto kun signifo "jes" sone similas al la angla "ne", dum la nea vorto sonas kiel "OK", kio povus kaŭzi seriozajn ĝenojn.

Ĉu ne pli bone, ke ĉiuj nacioj flankenmetu iujn el siaj rutinaj zorgoj por kunmeti la kapojn kaj ellabori komunan lingvon? Mi ne proponas reiron al la latina, kiu siatempe kaj longe bone servis. Povus okazi, ke problemojn kreus modernigo de la vortaro: kiel latinigi la anglajn "MIRV" (speco de militraketo), "over-

kill” (troa mortigo), “hijack” (kaperi) aŭ “short-term capital flow” (kapitalfluo en mallonga daŭro)? Kaj tamen ne devus prezentiĝi malfacilaĵoj, se oni bone uzus sian penskapablon aŭ tiun de meze saĝa komputero. Oni simple registru la vortarojn de la mondo kun instrukcio elsputi unuecan kunmetitan vortaron en la universallingvo, kiu estu la ĉefa fremdlingvo de ĉiuj lernejoj: post deko da jaroj, diplomatoj el Ankaro kaj Ateno povus en sia unua kunsido jam babili kvazaŭ paseroj. Kaj ne nur ili; ĉar, se iam la turisto kaj la eksporta komercisto povos forĵeti la frazlibron en fremda lando, ili povos rigardi la enloĝantojn kiel homojn, anstataŭ kiel homformatajn vivaparatojn, kiuj faras strangajn kaj nekompreneblajn bruojn. En la nuna situacio, la unua (kaj lasta) penso

kiun oni havas pri, ekzemple, Svedio estas, ke ĝi estas plena de svedoj. Kion oni per tio atingas, se temas pri reciproka interkompreniĝo?

Ekzistas kompreneble universala lingvo Esperanto. Jam de preskaŭ naŭdek jaroj. Ial, malgraŭ la “esperiga” nomo, ĝi ne sufiĉe disvastiĝis. La kialon mi ne komprenas, aŭ kiel ŝajne diras la nederlandanoj, “Ik begrijp niet”.

Eble la bezono ĝis nun neniam estis sufiĉe granda. Kredeble vi konsentas, ke ĝi nun estas sufiĉe granda. Ni ne povas havi tro da tutmonda kompreno, kaj ne temas pri la relative malgrava demando kiel ni vendu aviadilojn unuj al la aliaj.

Basil Boothroyd

PUBLIKA LETERO AL LA EŬROPA ESPERANTISTARO:

Grava iniciato restis seneĥa

ESPERANTO EN LA LERNEJOJN! Tiun sloganon ni jam aŭdas dum pluraj jardekoj, sed ĝi estiĝis ne pli ol slogano. Ĉu ĉiuj esperantistoj vere deziras la enkondukon de Esperanto en la lernejojn? Ĉu ili ekzemple estas pretaj elspezi monon por ebligi tiun enkondukon en lernejojn de Eŭropo? Ŝajne, ne! Ŝajne ili ne komprenas, ke agado necesas por atingi ion! Dum pluraj jaroj la Eŭropa Esperanto-Centro (EEC) agis kune kun la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) en la kadro de la Eŭropa Instruista Unuiĝo (EIU) kaj la Eŭropa Kulturcentro (EK) en Ĝenevo — ambaŭ ne-esperantistaj institucioj — por konvinki ilin pri la valoro kaj neceso de Esperanto.

La plej grava pozitiva rezulto el tiu agado estas, ke EK eldonas sian bultenon por eŭropcivitisma edukado, *Eŭropa Dokumentaro* ankaŭ en Esperanto (antaŭe nur en la angla kaj la franca). Ĝi traktas interesajn temojn pri la evoluo de Eŭropo kaj ĝiaj popoloj. Por garantii la eldonadon necesas 500 abonantoj je la 1-a de januaro 1975. Hontinda fakto estas, ke je la 1-a de septembro estis nur 268 abonantoj en Eŭropo kaj 10 ekster la kontinento. Kial tiu abono estas tiel grava? ILEI startos lingvajn eksperimentojn en lernejoj de pliaj regionoj en Eŭropo. EIU kaj EK multe povas helpi en tiu kampanjo per subteno kaj subvencio. Ilia kunlaboro estas nepre necesega. Sed, ne jam ekzistas 500 esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la instruado en Eŭropo, nek pri la instruado de Esperanto. Kiel ni do povos atendi, ke la eŭropaj instancoj interesiĝas pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn? La nederlanda sekcio de ILEI sendis gravajn proponojn al la edukministro; la sekcioj de Belgio, Britio, Danlando, Germanio kaj Italio agas samsence. Ĉiuj proponoj estos

senvalaraj se EK malrekomendos la akcepton al la Konsilio de Edukministroj. La estraro de EK estas favora al Esperanto, ĝi tute bone komprenas la neceson de internacia lingvo. Sed, ĝi povas agi nur se la esperantistoj mem deziras montri sian intereson kaj aktivecon pri la instruado de la lingvo.


“Esperanto en la lernejojn” ne plu estu slogano, ĝi fariĝu realeco. Vi elspezu 9 Sv. frankojn por abono de *Eŭropa Dokumentaro*, kiu aperas kvarfoje jare. Tiel vi helpas la enkondukon de Esperanto en la lernejojn. Sendu tuj poŝtkarton kun via abonmendo al: Eŭropa Esperanto-Centro, Frederikslaan 47, Schoorl-1719, Nederlando, aŭ al la Libroservo de UEA.

Rimarko: Se vi abonas *Eŭropan Dokumentaron* pere de UEA, notu, ke la prezo estas 8,50 (por Nederlando 8,84) guldenoj.

Alvoko el Hindio

Post mia 15-jara restado ĉi tie en Hindio, ek-estas interesiĝo pri Esperanto. Sed, estante 75-jara, ne tre sana kaj senmona, mi devas definitive reiri al Francio. Pro tio estus bone, se iu aktivulo dediĉus kelkajn jarojn de sia vivo por efektivigi la komencitajn laborojn ĉi tie. Konvenus ankaŭ, ke paroladistoj vizitu la lokojn kie jam troviĝas seriozaj esperantistoj, por vigligi ilin kaj veki interesiĝon ĉe la publiko. Kiu havas intereson pri ĉi tiu propono, bonvolu peti informojn pri la ĉi-tieaj Movado kaj vivkondiĉoj, farante tion kiel eble plej baldaŭ, ĉar mi forlasis Hindion en decembro 1974.

S-ino M. Haudebine
C-55, N.D.S.E.-2, New Delhi-110049, Hindio



La 47a Kongreso de SAT en Bergamo: La pordoj restas malfermitaj nur por la membroj.

KONGRESO DE SAT:

Kontaktoj kun sindikato

LA 47a KONGRESO de Sennacieca Asocio Tutmonda okazis ĉi-jare de la 3a ĝis la 9a de aŭgusto en la norditala urbo Bergamo. Partoprenis en ĝi ĉirkaŭ 330 personoj el 20 landoj, inter kiuj ankaŭ el la ekstereŭropaj ŝtatoj Usono kaj Kanado, kie SAT-membraro en la pasintaj jaroj konsiderinde kreskis. La kongreso estis el diversaj vidpunktoj sukcesplena. La LKK antaŭe nodis bonajn rilatojn kun la gazetaro de la urbo kaj el tio rezultis pluraj artikoloj pri la kongresaj laboroj. Krome, la esperantistoj neatendite atingis la frontpaĝojn de lokaj ĵurnaloj pro alia afero: En la nokto ĝuste antaŭ la inaŭguro eksplodis bombo en vagonaro, kiu estis survoje al Venecio. Oni nombris dekojn da mortintoj kaj vunditoj. Kiam la SAT-anoj dum la malfermo aŭdis pri tiu abomena (faŝista?) ago, ekregis ĝeneralaj indignego kaj konsterno. Ne nur sendo de kondolencitelegramo estis decidita, sed ankaŭ dono de sango por la viktimoj. Grupo de tiuj sangodonacintoj aperis sur foto kun favora subteksto en du gravaj lokaj ĵurnaloj.

Ankaŭ el organiza vidpunkto, la kongreso estis sukcesa. La jarraportoj de la estraranoj estis, post viglaj diskutoj, ĉiuj unuanime akceptitaj. La plenumkomitato en Parizo ricevis la fidon de la membroj. Oni akceptis proponon pri refondo de la socialista frakcio. Por la bona kompreno mi aldonas, ke sampartianoj en SAT povas formi grupon aŭ frakcion, kies celo estas la enkonduko de Esperanto en la mediojn de la propra partio.

Fruktodonaj fariĝis kontaktoj kun la sindikatoj en Lombardio, la provinco en kiu kuŝas Bergamo. Oni


aranĝis renkontojn kun reprezentantoj de tiuj organizoj en la kongresurbo kaj en pluraj aliaj urboj, kiujn oni vizitis dum la ekskursoj. Horojn daŭris kun ili ekz. la diskutado en San Pellegrino, la urbeto kun la fama fabrikego de mineralakvoj.

La distraj programoj estis variaj kaj bone prizorgitaj kaj ĝenerale vekis laŭdojn de la partoprenantoj. Impresis la bergama folkloro trupo per i.a. prezentado de praaĵ formoj de "commedia dell'arte". Surprizis la ludado de la drama grupo el Zagrebo, kies diversaj skeĉoj kaj la dramo "La morto de lia ekscelenco" tiel plaĉis, ke la LKK, kiu aranĝos la SAT-kongreson en Hago en 1975, tuj invitis la teatristojn ankaŭ al la nederlanda urbo.

Oni samtiel notis sukcesojn ĉe la oficialaj instancoj. La inaŭguro, en kiu parolis komunumaj reprezentantoj, okazis en la urbodomo, staranta sur la mirinde bela ĉefplaco de Bergamo. Dum la tuta semajno flirtis tie, fiksita sur la balkono, la esperanta flago. En tiu ĉi kadro estas ankoraŭ menciinda, ke la turista organizo lombardia regalis la kongresanojn per abunda, festetosa bankedo ĉe la Lago de Komo.

Eĉ post la sukcesa kongreso, la SAT-gvidantoj devas konsciiĝi pri kelkaj malfortaj facetoj de la organizaĵo. Nur tuŝe mi faras jenajn du demandojn: Ĉu oni ne pli trafe disvastigus la ideojn de la Asocio, malfermante dum la kongresoj la pordon ankaŭ al ne SAT-anoj aŭ iliaj familianoj? Ĉu ne estus eble doni al SAT-kongresoj iom la karakteron de seminario aŭ laborista universitato?

E. Borsboom



La palaco Christiansborg loĝigas la Parlamenton, Superan Kortumon kaj la Ministerion de Eksteraj Aferoj.

LA 60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago triafoje

KOPENHAGO estas malnova urbo. Jam en la jaro 1167, la episkopo Absalon konstruis kastelon ĉirkaŭ kiu kreskis la urbo Havn, poste konatigonta kiel Købmanna-Havn (la haveno de la komercistoj), ĉar ĝi por la komerco baldaŭ fariĝis la centro de la skandinavia kaj nordgermana mondo.

En la centro de la moderna Kopenhago staras statuo: Sur ĉevalo, la militema episkopo rigardas trans pitoreskan kanalon al la kerno de la urbo. Sur la ruinoj de la kastelo de Absalon, nun staras la palaco Christiansborg, la sidejo de la Parlamento. La rigardo de la episkopo sukcesas ampleksi turojn de pluraj belaj, malnovaj preĝejoj de Kopenhago kaj la “drakoturon” de la fama renesanca konstruaĵo de la kopenhaga borso, — ĉio ĉi kuŝas rekte antaŭ li. Sed, se la rajdanta episkopo turnas sian rigardon iom dekstren, pluraj muzeoj de la urbo situas antaŭ liaj okuloj. Tiel la maljuna episkopo kun fiero povas kontroli la centron de la regado, komerco, kultura kaj eklezia vivoj, en kion transformiĝis la urbo fondita de li


antaŭ 800 jaroj, nun miliona ĉefurbo de Danlando, Kopenhago, kiu al siaj vizitantoj malkaŝas aŭtentikan belecon kaj tute apartan etoson.

Tamen, el la tempoj de la episkopo Absalon, en Kopenhago oni nun povas vidi nenion krom la ruinoj sub la palaco Christiansborg. Bruloj, militoj kaj bombardoj neniigis ĉion alian. La plej malnova konservita parto de Kopenhago devenas el la tempo de Christian la Kvara. Tiu ĉi reĝo, kiu regis inter la jaroj 1588 kaj 1648, konstruigis la renesancan palacon Rosenborg kaj priplantis la al ĝi apartenantan ĝardenon, kiu nun estas publika parko, gastiganta interalie ankaŭ statuon de la fama fabelverkisto H.C. Andersen. La sama reĝo, al kiu Kopenhago ŝuldas la ekziston de pluraj aliaj belaĵoj, konstruigis ankaŭ la “Rondan Turon”, en kiu la rusa caro Petro la Granda, en la jaro 1642, suprenveturis per kvarĉevala kaleŝo.

Ankaŭ la malnovaj preĝejoj de la dana ĉefurbo povas rakonti pri la historio kaj kulturo de la lando. La Preĝejo de Nia Savinto kun sia spirala turo, regule

estas la celo de ĉiu vizitanto de Kopenhago. La Grundtvig-Preĝejo – moderna manifestiĝo de la mez-epoka preĝeja konstrustilo – de multaj turistoj estas konsiderata kiel ilia plej granda travivaĵo en la ĉef-urbo de Danlando.

Oni volonte vagas en Kopenhago. La amikecaj, amuzaj stratetoj kaj kanaloj de la malnova urboparto renkontiĝas kaj kruciĝas ĉe pitoreskaj placoj kaj bazaroj. Unu el la plej belaj inter ili estas la palaca placo de la reĝa rezidejo Amalienborg. La placon ĉirkaŭas kvar rokoko-palacoj, kaj en ĝia mezo pompas skulptaĵo de Sally, prezentanta la danan reĝon Frederiko la Kvina. De Amalienborg-placo, la strato Amaliegade kondukas rekte al la Gefion-fontano, ĉe kiu komenciĝas Langelinie, promenejo, kiu etendiĝas laŭlonge de la kopenhaga haveno. Tie ĉi, ĉe la limo inter la urbo kaj la maro, oni renkontas la faman skulptaĵon de “Marvirineto”, inspiritan de la fabeloj de Andersen. Alia bela placo estas Kongens Nytorv (la Nova Reĝa Placo), kie troviĝas la konstruaĵoj de la reĝa teatro, akademio de artoj kaj la reĝa baletlo. De ĉi tie, la mallarĝa promen-strato Strøget kondukas al la Urbodoma Placo. Apude situas ankaŭ la fama parko Tivoli, kies gaja etoso estas ĉiam denove malkovrata eĉ de kopenhaganoj mem.



Supre: En la parko de la palaco Rosenberg, la bona maljuna avo, Hans Christian Andersen (1805-1875), senlace rakontas siajn fabelojn al la tutmonda infanaro. Andersen certe estas la plej konata dano, tiom konata kaj populara, ke li jam delonge estas adoptita en ĉiuj partoj de la terglobo. Laŭ la vivojaroj de la granda verkisto, vi konstatas, ke la jubilea 60a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kopenhago, ĝuste en la jaro kiam la tuta mondo markos la centjaran datrevenon de la morto de la plej konata fabelverkisto.

Maldekstre: Kiam la skandinavia flugkompanio SAS konstruigis la kurten-fasadan hotelon (dekstre, antaŭe sur la foto), en la jaro 1960, ĝia projektinto prof. Arne Jacobsen, devis ankoraŭ arde defendi sian verkon kaj ĝiajn modernajn konceptojn. Ne temis nur pri la fasado, sed pri ĉio – meblaro, tapiŝoj, kurtenoj, manĝilaro, ktp. – ĉio portas stampon de la fama arkitekto.



60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Kopenhago (Frederiksberg), 1975 07 26 — 08 02

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam
-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Postboks
1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Kie ĝi okazos?

Ankoraŭ ĝis la lasta Universala Kongreso en Hamburgo, ne estis atingita decido pri la urbo de la jubilea 60a UK — jubilea, ĉar ĝi estas ne nur la 60a, sed okazos ĝuste 70 jarojn post la tutunua UK en Boulogne-sur-Mer. Fine, lastmomente, la nova Estraro de UEA akceptis la inviton de Kopenhago, kie rapide formita Loka Kongresa Komitato nun eksprese solvas la organizajn problemojn. Oficiale la Kongreso okazos en Kopenhago (Frederiksberg), ĉar la kongresejo elektita situas en la komunumo Frederiksberg, sendependa administra unuo en la koro de la ĉefurbo. La kongresejo, danlingve “Falkoner Centret”, estas moderne ekipita komplekso kun granda salono por pli ol 2 000 personoj, alia por mil personoj kaj pluraj malpli grandaj, kune kun tre komfortaj sidejoj por la interkunvenaj paŭzoj. En la sama konstruaĵo troviĝas multetaĝa luksa hotelo “3 Falke”, restoracio, banko, vojaĝagentejo kaj butikoj.

Kiu estas kiu en LKK?

La nomoj de la membroj de LKK estas jenaj (en parentezoj aperas iliaj funkcioj kaj respondecoj): Gustav Kühlmann (prezidanto; ĝeneralaj aferoj kaj loĝado), Svend Dragsted (vicprezidanto; gazetaro, artaj aranĝoj), Ejnar Hansen (vicprezidanto; ekskursoj), Karen Hansen (kasisto), Bodil Kühlmann (sekretario; junularo, infana kongreseto), Lizeta Kühlmann (sekretario), Jan Strønne (membro), Victor Sadler (membro), Simo Milojević (membro), Rich. Fiirgaard kaj J.E. Slottboe (revizoroj).

Internacia subteno petata!

Konforme al la Kongresa Regularo, LKK starigas tiel nomatan “Garantian Kapitalon” por kovri eventualan deficiton. La garantioj povas konsisti el nuraj promesoj kontribui laŭvole difinitan sumon, se la Kongreso neatendite havos deficiton, aŭ ili povas konsisti el efektivaj pagoj, kompreneble repageblaj post la Kongreso, se, kiel kutime, ĝia rezulto estas finance pozitiva. La kuraĝa gesto de la kopenhaganoj, inviti la

Kongreson tiel lastmomente, kun apenaŭ unu jaro da prepartempo, meritas same varman subtenon de la Esperanta publiko, kaj LKK volonte akceptos garantiojn ne nur el la kongresa lando sed ankaŭ el la monda Movado. Samtempe ĝi esprimas koran dankon al la multaj personoj, kiuj jam en Hamburgo promesis sian helpon. Garantiaj promesoj aŭ pagoj estu adresitaj al: 60a Universala Kongreso de Esperanto, Postboks 1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando (poŝta ĝirkonto 626 06 24).

Nepre valoras aliĝi frue!

Por Kopenhago estas eĉ pli avantaĝe, ol kutime, aliĝi en la unua kotizperiodo (ĝis la 31a de decembro 1974). Ĝis tiu dato oni pagas 20% malpli, ol en la posta periodo! (Kutime la diferenco estas 10%.) Jen la tarifo valida ĝis la jarfino:

Kategorio	Gld.	D. Kr.
1. Ne membro individua de UEA	118,—	270,—
2. Individua membro kun Jarlibro (MJ)	98,—	224,—
3. Individua membro kun revuo (MA k.a.)	78,—	178,—
4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1	82,60	188,60
5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2		
aŭ 3	68,60	156,70
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara	35,40	80,90
7. Universitata studento ĝis inkluzive 30-j.	59,—	134,80
8. Blindulo	47,20	107,80

Trikolora glumarko aperonta

Baldaŭ aperos bela tri-kolora reklama glumarko pri la Kongreso laŭ la emblemo projektita de Franko Luin (Svedio). La prezo estos, kiel kutime, 0,50 gld. (por Nederlando 0,58 gld.) por 10-marka folio. Oni bv. aldoni 10% por sendokostoj. Mendebla jam nun ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Pĉk. 378964.

Loĝigo: vasta elekto

Por sia dumkongresa loĝado la kongresanoj povos elekti el abundo da hoteloj diverskategoriaj, ekde “3 Falke” (komparebla kun “Loews Plaza” en Hamburgo) ĝis la plej malmultekostaj. Planoj por loĝigi ĉiujn dezirantojn jam bone reliefigas. Kiu preferas kampadon, tiu trovos vastan kaj bone ekipitan kampadejon proksime de la kongresejo. Prezoj de la jam rezervitaj hoteloj varias inter 30 kaj 250 danaj kronoj.

Jam tri karavanoj

Karavan-vojaĝojn al Kopenhago por la UK jam organizas: Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF; Japana Esperanto-Instituto, p/a s-ino Y. Isobe, 2-14-1 Minami Nagasaki, Toshimaku, Tokio; kaj s-ino Ŝ. Ooba (“Espero-karavano”), c/o Yamate suginami Build., I-7-3 Koenzi-minami, Suginami, Tokio, Japanio 166.

LABORPROGRAMO DE TEJO:

Kion oni faros ?

LA PLEJ FREŜA numero de *TEJO-Novaĵoj*, stencilita bulteno, kiu iasence konkurencas al tiu ĉi paĝo de nia revuo kaj kies utilon oni verŝajne devus reekzameni nun kiam UEA klopodegas ŝpari sur ĉiuj kampoj de la aktiveco, estas komplete dediĉita al iaspeca laborplano de la junulara sekcio de UEA. Fakte, ne temas pri vera laborplano, nek ĝi titolas tiel. Ĝi nomiĝas "Trijara gvidlinio de TEJO (1975-1977)" kaj klopodas elstarigi la ĉefajn taskojn pri kiuj TEJO okupiĝos dum la sekvantaj tri jaroj.

La bazo de la menciita dokumento, kiun akceptis TEJO-Komitato dum la 30a IJK en Münster, estas la Tria baza laborplano de UEA, akceptita dum la Kongreso en Beogrado, kvankam la "gvidlinio" elstarigas ankaŭ kelkajn internajn dokumentojn, kiuj mejloŝtonis en la lastatempa evoluo de TEJO (Deklaracio de Tyresö, Rezolucio de Toruń). Por tiuj, kiuj dum la lastaj jaroj ne rigardis kun simpatio la kunlaboron de TEJO kun kelkaj neesperantistaj junularaj organizaĵoj, inklinante al ofta misinterpreto de tiurilataj paŝoj kaj celoj de TEJO, la nova dokumento enhavas tute klaran frazon, kiu tekstas: "TEJO estas internacia organizo, kiu en ĉiuj siaj pozicioj devas resti strikte senpartia, kio tamen ne malhelpas la esprimon de politik-ideologiaj starpunktoj de ĝiaj membroj."

Dum la sekvantaj tri jaroj, TEJO intencas dediĉi apartan atenton al sia interna agado (landaj sekcioj, varbado, administracio, edukado, servoj, studoj), kie apartenas ankaŭ la ellaboro de nova statuto, kiu devus esti preta dum la jaro 1975. En la sama periodo, TEJO planas intensigi siajn rilatojn kun Esperantaj junularaj organizaĵoj (Ĉu tio inkluzivas ankaŭ la junularan sekcion de SAT?), precipe kun kelkaj fakaj organizaĵoj, kies celoj koincidas kun aŭ komplementas tiujn de TEJO. Elstaran lokon en la "gvidlinio" okupas la regiona agado, kiu ĉefe celos landojn sen (aŭ sen forta) sekcio de TEJO. Ankaŭ la agado, kiun prizorgas KER (Komisiono por Eksteraj Rilatoj), kaj kiu ĉefe celas neesperantistajn junularajn organizaĵojn, ricevis merititan atenton en la nova laborprogramo de TEJO.

Ŝrumpo

KONCIZE terure konciziĝis: kvar paĝoj por kvin landaj sekcioj de TEJO (belga, franca, germana, itala, nederlanda). Tiel almenaŭ aspektas la julia-aŭgusta numero de la iam populara kaj sagaca informilo.

Cetere, en tiu numero sian spacon okupis nur la franca kaj nederlanda sekcioj. Kiel kutime, ankaŭ la lasta numero de *Koncize* estas modele teknike prizorgita. Tamen, eble oni ĝuste tiun laboron por prizorgi belan aspekton de *Koncize* povus pli bone investi. Ĉu la landaj sekcioj de TEJO kelkfoje ne povus doni bonan ekzemplon al la landaj asocioj de UEA rilate la celtrafecon de siaj eldonaĵoj? (Kompreneble, ke la celo de ĉi tiuj linioj estas kolerigi la kvin landajn sekciojn de TEJO, des pli, ke el kolero fojfoje naskiĝas tute saĝaj ideoj).

31a
IJK

Kiel ni lastmomente eksciis de Klaus Schubert, en la Estraro de TEJO ŝargita pri kongresoj kaj konferencoj, la 31a Internacia Junulara Konferenco de TEJO tre verŝajne okazos en la dana urbeto Herning, kiu situas en la centra Jutlando kaj nombras ĉirkaŭ 30 000 loĝantojn. La tempo: la semajno post la 60a UK.

La skolta nodo


FINE DE JULIO, la prezidanto de la Skolta Esperanto-Ligo, John Berggreen, vizitis la Skoltan Mondan Oficejon en Ĝenevo, kie laboras 18 oficistoj, kiuj kune regas 30 diversajn lingvojn. Kvankam la oficialaj lingvoj de la Skolta Movado estas la angla kaj la franca, oni nun akceptas leterojn en ĉiuj lingvoj, sed respondas nur angle aŭ france. Povas esti, ke la kampanjo de TEJO pri "lingva imperiismo" kontribuis, ke la skolta organizaĵo alprenu almenaŭ tiun unuan sendiskriminacian paŝon, kiu rilatas la pretecon akcepti leterojn en ĉiuj naciaj lingvoj.

Sed, montriĝis, ke eĉ la 18 poliglotoj kun siaj 30 lingvoj — ne sufiĉas, ĉar en la skoltan centron venas leteroj en 40 diversaj naciaj lingvoj. Oni do regule devas uzi la multekostajn servojn de profesiaj tradukistoj, des pli, ke lastatempe la leteroj, kiuj venas en la araba, germana kaj hispana, nombre superas tiujn, kiuj estas skribitaj en la franca.

Oni jam faras premon pri oficialigo de la hispana kaj araba en la Skolta Movado, kaj — iom surprize — el Hispanio venis propono pri oficialigo de Esperanto. Tamen, la organizaĵo ne havas monon por efektiviĝi oficialigon de pliaj lingvoj kaj ĝi kun aparta scivolo atendas la rezultojn, kiujn montros la uzo de Esperanto dum la venontjara monda ĵamboreo en Norvegio. Lige kun tio ĉi, la ĝenerala sekretario de la Skolta Movado esprimis al s-ro Berggreen sian pretecon pli efike apogi la celojn de la Skolta Esperanto-Ligo. Ĉu la Internacia Lingvo solvos la skoltan lingvan nodon?

Sub noktmeza suno

LA 44a NORVEGA Esperanto-Kongreso okazos en Tromsø de la 4a ĝis la 7a de julio 1975. Ĝin aranĝos la Esperanto-klubo "La Norda Lumo", la plej norda Esperanto-klubo en la mondo. Nur unufoje ĝis nun Norvega Esperantista Ligo okazigis sian kongreson en la norda Norvegujo, nome en Narvik en 1953. Ni antaŭvidas grandan interesigon por la kongreso. Kompreneble, ni atendas multajn norvegajn kongresanojn, sed ni invitas ankaŭ la esperantistojn el la tuta mondo. Tromsø estas la plej granda urbo en la norda Norvegujo, kun proksimume 43 000 loĝantoj, kaj ĝi kreskas rapide, ĉefe pro la nova universitato. Laŭ areo Tromsø estas la plej granda urbo en nia lando: 2 400 km². La urba centro estas la insulo Tromsøy, en la markolo Tromsøysund. Du modernaj pontoj, longaj po pli ol 1 000 m (v. la foton), ligas la insulon al la kontinento oriente kaj al la granda insulo Kvaløya okcidente.




Situante je preskaŭ 70° de norda latitudo, Tromsø estas la plej granda urba komunumo de la mondo tiel proksime al la Norda Poluso. Dum multaj jaroj la urbo funkciis kiel elirpunkto de ekspedicioj kaj aliaj vojaĝoj en la arktaĵaj regionoj. Aro da esploristoj ekiris de Tromsø al Svalbardo (Spicbergo) kaj aliaj arktaĵaj lokoj. Plej konataj estas André, Amundsen, Nansen. Tial la urbo ofte estas nomata la Pordego al la Arkta Maro.

Dum la somero, la tagoj daŭras longe ĉi tie en la nordo. De majo ĝis aŭgusto, la noktoj estas lumaj kiel tagoj. De la 21a de majo ĝis la 23a de julio, la suno ne iras sub la horizonton; ni havas noktomezan sunon.

Kiam la programo de la kongreso estos preta, ni dissendos ĝin al interesigantoj, kun aligilo. Sed atentu: la kongreso okazos dum la turisma sezono kaj necesas mendi lokojn en hoteloj, ŝipoj ktp. tre frue. Ni petas ĉiujn interesigantojn, provizore anonci sin tre baldaŭ al la adreso: s-ro Rolf Holm, Lanesvn. 15, N-9000 Tromsø, Norvegujo; telefono: (4783) 82 154.

Herolv Olsen



Stampedo

LA SUPRA TITOLO verŝajne ne diras multon al la plimulto de niaj legantoj, samkiel ĝi restis malklara al la redakcio. Nu, por iom helpi la orientigon, ni diru, ke "stampedo" devus esti io simila al la usona "rodeo". Tamen, se ankaŭ tio ne sufiĉas, rigardu la supran bildon kaj vi konkludos, ke temas pri sufiĉe ekscita sporto en kiu ĉefrolas stalonoj. Kalgario siavice ne devus prezenti apartajn problemojn, ĉar temas ja pri la kanada urbo (Calgary), en la okcidenta parto de la lando, en la regiono de la fama Roka Montaro. Ĉiukaze, pri Kalgario, kiu venontjare festos sian 100-jaran datrevenon, oni lastatempe ofte aŭdas en la kanada Esperanto-movado, ĉefe pro la aktiveco de la tiea loka klubo. En julio ĉi-jare, kaj tie ĝi estas la "stampeda" monato, Kalgaria Esperanto-Klubo partoprenis la t.n. "stampedan" paradon, kiu laŭiris vojon longan ok kilometrojn, kaj kiun vidis 170 000 ĉeestantaj spektantoj kaj kelkaj pliaj centmiloj sur siaj televid-ekranoj. Ĉefrolis en la parado la granda globo kaj la parada "floso" kun reklamoj pri Esperanto (v. la alian foton).

Ankoraŭ rememorante la eventojn de la ĉi-jara "stampedo", la Kalgaria Esperanto-Klubo pretiĝas por la sekvontjaraj eventoj. Unu el ili minacas superi la gloron de la "stampedo", almenaŭ kiam temas pri la Klubo kaj ĝiaj ĉefaj aktivuloj Betty Salt (prezidentino) kaj Dorothy Hawley (sekretariino). Nome, inter la 28a kaj 30a de junio 1975, Kalgario gastigos la 17an



Kanadan Esperanto-Kongreson. Kontraŭ unu respond-kupono petantoj povas aerpoŝte ricevi aligilon kaj belan prospekton. La petojn oni bonvolu adresi al: Kalgaria Esperanto-Klubo, 3019 Hampton Crescent, S.W., Calgary, Alberta T3E 4R1, Kanado.

Ege utila kaj alte aprezinda

Recenzas Michel Duc Goninaz (Francio):

Esperanta-rusa vortaro, de E.A. Bokarev. Moskvo: Soveta enciklopedio, 1974. 488p. 17cm.

Ok jarojn post la *Rusa-esperanta vortaro* fine aperis, en la samaj kolekto kaj formato, la *Esperanta-rusa* de la eminenta rusa lingvisto E.A. Bokarev, mortinta dum la finpreparo de tiu ĉi eldonaĵo. Detala kaj ĝisdata — ĝi enhavas ĉ. 26 000 vortojn —, ĉi tiu vortaro estas gravega verko por la ruslingvaj esperantistoj, kiuj disponas ĝenerale pri malmulta didaktika materialo por la studado de nia lingvo.

Karakterizaĵo de tiu ĉi vortaro estas la alfabeto ordigo de la kunmetitaj kaj prefiksohavaj vortoj. Tia aranĝo estas certe pli oportuna por la lernanto, sed ĝi kaŭzas arbitran distingon inter sufiksohavaj vortoj kaj aliaj kunmetaĵoj (kio ne respondas al la vera strukturo de Esperanto) kaj donas impreson pri finieco de la vort-trezoro: la arbitra elekto de la aŭtoro estas pli okul-frapa ol en tradiciaj — “laŭradikaj” — vortaroj. En estas *ĉenhundo*, forestas *ĉenkanto*; troviĝas vortoj kun duba utileco, kiel *kaŝmortigisto*, aŭ duba korekteco, kiel *bonrikolto*; mankas vorto kiel *enamiĝi* k.s. La verboj estas tradukitaj imperfektive se ili estas “simplaj”, perfektive se ili estas prefiksohavaj. Sed enestas nekonsekvencaĵoj: kial *malfermi* = *otkryvat'* kaj *aperti* = *otkryt'*, *plibeligi* = *ukrasit'* kaj *plibonigi* = *uluĉsat'*, *vendi* = *prodavat'* kaj *aĉeti* = *kupit'*?

Kompreneble, la vortaro de Bokarev ne enhavas ĉiujn neologismojn troviĝantajn en *PIV*. Sed ĝi alprenis kelkajn aliajn: *galgo* (= pendumilo), *sarseneto* (= tafto), *splankna* (en *PIV* enestas nur *splanknologio*), *ĥalato* (la rusa *ĥalat*) k.a. Iuj vortoj havas difinon pli larĝan ol en *PIV* (*ĝigolo*, *abrupta*, *absorbi*, malprave por la du lastaj), aliaj sencon pli limigitan: *gado* (ne nepre moruo), *insulti* (por kiu mankas la fundamenta netransitiva senco: *rugat'sja*), *interveni* (por kiu la traduko *vtorgat'sja* ne sufiĉas). Kritikindaj estas ankaŭ la tradukoj de *diserti* (“defendi disertaĵon”), *pasumi* (“pasigi tempon” anst. la *PIV*-a “sencele promeni”), *daktilografo*, sinonimigita kun *skribmaŝino*, *orienti*, uzata en la senco de *orientiĝi*, *rekrutigi* anst. *rekruti*, *amori* tradukita per *byt' vlyublennym* (*esti enamiĝinta!*)

El stila vidpunkto, oni devas ankaŭ konstati, ke, pro konsideroj supozeble ekstersciencaj, vortoj familiaraj, kiel *merdo*, *kaco*, *fiki*, kaj eĉ la slavdevena *piĉo*, ne estas tradukitaj per samstilaj rusaj vortoj, sed per vortoj stile neŭtralaj aŭ pezaj glosoj. Ni notu ankaŭ la

difinon de SAT (sub la artikolo *satano*): “dekstre-oportunisma esperanta organizaĵo”. Do — ĉar ĉio estas ja relativa — pli “dekstra” kaj pli “oportunisma” ol la aliaj, ekzemple UEA. Ĉu objekte?

Entute, malgraŭ detalaj kritikindaĵoj, verko ege utila kaj alte aprezinda.

Mendu ĉe UEA: 4,50 (por Nederlando 4,68) gld. plus sendokostoj 10%.

Kontraŭ tradicio

Recenzas M. Gjivoje (Jugoslavio):

Nova geografio, de Nio. Milano: 1971. 32+12p. 17cm.

La aŭtoro prezentas kvar planojn: pri ŝanĝo de geografiaj mezuroj, tempomezuroj (horsistemo), kalendaro kaj geografiaj nomoj. Li proponas la 360 meridianojn ŝanĝi al 400 kaj la 90 paralelojn al 100, kaj la tiel ricevitaĵojn kvadratojn dividi en pluajn centonojn. Ĉiuj geografiaj objektoj estu nomataj laŭ la koordinatoj. La tago estu dividita en 20 horojn, la horoj en 100 minutojn, kaj tiuj en 100 sekundojn. La jaro estu dividita en 52 semajnojn, sen monatoj.

La aŭtoro faris grandan mensan streĉon por konstrui sian logikan sistemon. Kelkaj liaj proponoj estas avantaĝaj kaj, sendube, praktikaj, sed pro la jam tradicia konservativeco de la homoj — nerealigeblaj. Ni memorigu nur pri la malsukceso kiun ĝisvivis la reformemuloj de la kalendaro.

Mendu ĉe UEA: 3,— (por Nederlando 3,12) gld. plus sendokostoj 10%.

Instruplena trarigardo

Recenzas Gaston Waringhien (Francio):

Ni laboru kaj esperu!, plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 2. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1974. 342p. 22cm. Bind.

Sub tiu enigma titolo aperis la dua “kajero” de la “iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof” — giganta entrepreno, kiu ne timigis la pseŭdoniman s-ron Ludovikito. La libro entenas en kronologia ordo ĉion, kion Zamenhof skribis de 1887 ĝis 1891 (krom la unuaj 3 broŝuroj aperintaj en la “kajero 1”, vd. *Esperanto* nov. 73): plejparto el tiuj tekstoj jam aperis en la *Originala Verkaro* kompilita de Dietterle (1929), sed tie disigitaj sub diversaj ĉapitroj; al tiuj Ludovikito aldonis zamenhofaĵojn poste publikigitajn de s-ro Holzhaus, sed precipe li tiris el la kolekto de la *Esperantisto* multajn pecojn preterlasitajn de lia

antaŭulo. La tuto ebligas instruplenan trarigardon de la aktiveco de Zamenhof en tiuj kvar jaroj, kvankam pri la intima tragedio de 1888, en kiu Zamenhof finance helpis sian patron, ke li ne perdu sian cenzuristan situacion, oni ĉi tie apenaŭ aludas. La transkribo de la originalaj tekstoj estas skrupule prizorgita — multe pli ĝusta ol tiu de Dietterle, eĉ pri la preleraroj (p. 117, lin.-7, oni certe legu “lasta” anstataŭ “vasta”, kiel prave jam korektis Dietterle); bedaŭrinde la kompilinto reproduktas, ĉe la rusaj tekstoj, la malelegantan tradukon de s-ro Holzhaus (ekz-e pli bonan tradukon de la Petskribo (p. 14-19) publikigis s-ro G. Teterin en *Heroldo* dec. 64). Postparolo de la kompilinto donas utilajn precizigojn pri la uzitaj originalaĵoj aŭ fontoj, kun daŭrigo de la provaj financaj taksoj de la budĝeto de Zamenhof. Du finaj indeksoj, unu priafera, la dua kronologia, kompletigas la verkon, kiun mi varme rekomendas al ĉiu, kiu interesiĝas pri la komenciĝoj de nia movado kaj la rolo de ties iniciatinto. Oni al kutimiĝos al la japana tipografio, kiu ignoras la uzadon de la majuskloj kaj de la kursivoj en la komentariaj partoj, konforme al la moderna modo eviti ĉion, kion la forpasintaj tipografoj elpensis por faciligi kaj klarigi la legadon. Pri la ilustraĵoj, mi vere ne kompetentas.

Mendu ĉe UEA: 19,80 (por Nederlando 20,59) gld. plus sendokostoj 10%.

Kalejdoskopop

Recenzas E. Tvaroŝek (Ĉeĥoslovakio):

Kalejdoskopop varieteo, de Ergoto de Bonaero. Bonaero: Argentina Esperanto-Instituto, 1974. 160p. 18cm. Jes, ĝi fakte estas kalejdoskopop de originalaj kaj tradukitaj eroj de plej diversaj ĝenroj — raportoj, recenzoj, mildaj satiroj, eseoj, poemoj, noveloj, kantetoj, ja eĉ prilingvaj polemikoj — ĉio en bunta miksaĵo. Kaj ne malinteresa, oni devas konfesi, malgraŭ tio, ke estas eroj tre diversvaloraj — de forlaseblaj (ĉar tro personaj kaj senpretendaj) bagatelaĵoj ĝis la vere legindaj “Se...” de R. Kipling aŭ la kortuŝa “La ĉevalo” de C. Buysse (tradukaĵoj). El la *Kalejdoskopop* oni ekscias pri diversaj opinioj de la aŭtoro (EdB) kaj de renomaj diversnaciaj verkistoj en prozo kaj versoj (en bona traduko de EdB), kaj oni ricevas kompetentan klerigon ekz. pri tio, kio estas “mateo” kaj pri kvar specoj de “gaŭĉo”.

Ergoto de Bonaero estas fervora kaj konscia esperantisto — li tion pravas per siaj poresperant(ist)aj kaj prilingvaj eroj en la libro. Feliĉe, kun siaj “herezaĵoj” (ekz. la opinio, ke estas superflue diferencigi inter fini kaj finiĝi) li espereble restos “soleca kuranto” (se ni ne kalkulas la neperfektulojn) kaj mi ne dubas, ke post certa tempo de donkiĥotado li revenos “en la tendaron de la fideluloj”. Cetere, siajn opiniojn li en la libro ne tre trudas, li valorigas ilin sindeteneme, kaj la lingvo de la libro, ankaŭ el la vidpunkto de la stilo, estas sur salutinda nivelo.

Malgraŭ tio, ke la oportunformata libro estas nur kserografie multobligita, la teksto estas klara kaj enhavas nur minimumon da cetere ne ĝenaj kaj tuj rimarkeblaj tajperaroj. Domage tamen, ke la aranĝo de la materialo estas iom tro lokŝparema; utilis iom pli da disiga spaco inter unuopaj eroj.

Mendu ĉe UEA: 9,— (por Nederlando 9,36) gld. plus sendokostoj 10%.

La furora temo

Recenzas L. Kordylewski (Pollando):

Elementa ekologio, de Stöp-Bowitz. Lieĝo: SUK, 1974. 95p. 29cm.

La branĉo de la natursciencoj, kiu nur antaŭ kelkdeko da jaroj faris la unuajn memstarajn paŝojn — la ekologio — nun frontas gravan interesiĝon vaste tra la mondo. Kial ĝi akiris tiel rapidan popularecon? La respondo oni trovas en la vortoj (pri kiuj ŝajnas nekonscii la difektantoj de la naturo) esprimitaj jam en la antaŭparolo de ĉi tiu verko: “...ni estas parto de la naturo, kiu konsistigas nian ekzistobazon kaj medion. La homo... posedas potencon kapablon... eĉ detrui tiun nian propran bazon. Tial estas esence grave por nia plua ekzistado kaj por nia prospero studi la funkciadon de la naturo... kiel tutaĵo.” Kaj ĝuste la ekologio, aplikante originalajn metodojn, koncernas preskaŭ ĉiujn ĝisnunajn natursciencajn branĉojn. La verko de C. Stöp-Bowitz donas facile kompreneblan trarigardon de la ekologia problemaro. Bone, ke la jenaj temoj de internacia signifo respeguliĝas ankaŭ en la Internacia Lingvo (vidu ankaŭ en *Kontakto*, n-roj 2 kaj 3, 1973). Laŭdinda estas ankaŭ la iniciato de la Someraj Universitataj Kursoj serioze pritrakti tiajn temojn kaj prizorgi ilian publikigon.

La verko havas la karakteron de universitata lernolibro; ĝi estas tajpskribita kun nemultnombraj, modestaj, sed klaraj kaj ĝuste priskribitaj skemoj kaj diagramoj; ĝi prezentiĝas kiel vere altnivela verko de sia speco. Post la enkonduko pri la bazaj nocioj, la aŭtoro prezentas la energian, produktan kaj ekvilibrantan problemaron. Sekvas pritrakto de la rilatoj en populacio kaj priskribo de ĝiaj ekzemploj en akvoj kaj sur la tero. Tute ĝuste, la verko finiĝas per ĉapitro pri la protektado de la naturo kaj ĝia medio. Ĉi tiu problemaro, kiel la plej alarma, estas substrekitaj kelkfoje en la teksto, ĉefe en la ĉapitro pri la natura ekvilibro. Krome, intereso trovas ĉe la fino liston de diverslingvaj lernolibroj pri ekologio.

Prave la verko aperis ankoraŭ antaŭ la ĉi-jara sesio de SUK, kie la ekologia problemaro estis lekciata kaj diskutata. La ĝustatempa apero povis volontigi iujn al partopreno en SUK '74, kaj en sia presita formo la verko ankaŭ utilis por ĉiuj aliaj interesitoj pri la natursciencaj temoj.

Mendu ĉe UEA: 19,80 (por Nederlando 20,59) gld. plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Ausführliche Sprachlehre des Esperanto (1932, represo 1973) H. Göhl. 295p. 20cm. Broŝ. 6,— gld. Tre detala germanlingva gramatiko de Esperanto.

Århus (1974) 24p. Kolorilus. 21cm. Turisma prospekto ricevebla ĉe: La turistoficejo, Urbodomo, DK-8000 Århus C, Danlando.

Ĉu vi parolas tendare? (2a eld., 1974) R. Corsetti, M. La Torre. 57+7+25p. 21cm. Broŝ. 2,50 gld. Nova eldono de bildkurso por labortendaroj.

Einigung Europas und ihr Sprachenproblem, Die (1974) W. Bormann. 12p. 21cm. Broŝ. 3,30 gld. (*Dokumente-Informationen*, 2). Pri la lingvaj problemoj de la Eŭropa Komunumo kaj la solvo, kiun Esperanto proponas.

Elementa Ekologio (1974) C. Stöp-Bowitz. 95p. 29cm. Broŝ. 19,80 gld. Kursoteksto de la Someraj Universitataj Kursoj 1974.

Finalo '73 (1973) Hajkista Klubo, Oosaka. 44p. 18cm. Broŝ. 1,20 gld. La lasta volumeto de sukcesa serio.

Fundamentaj konceptoj en kemio (1974) S. Kawamura. 78p. 29cm. Broŝ. 17,10 gld. Kursoteksto de la Someraj Universitataj Kursoj 1974.

Heroaj fratinetoj sur la stepo (1974) 89p. Ilus. 19x27cm. Broŝ. 2,70 gld. Ĉina bildrakonto.

Internacia lingvo por rusoj: Esperanta traduko de la rusaj tekstoj (1948, represo 1974) D-ro Esperanto. Tradukis L.L. Zamenhof kaj G. Ĉernohvostof. 8p. 20cm. Broŝ. 1,50 gld.

Kantanta mia bird' (1973) M. Hill, W. Auld 95p. 20cm. Broŝ. 3,90 gld. Dua kolekto de 58 britaj popolkantoj.

Kantu kun Ramona (1974) R. van Dalsem. 24p. 15cm. Broŝ. 2,70 gld. Tekstoj de la melodiarioj *Simplaj floroj* kaj *Roseroj*.

Letero al Emile Javal (1973) L.L. Zamenhof. 28p. 21cm. Broŝ. 3,90 gld. Fotoreprodukto de manskribita letero de Zamenhof kun dato 1905 09 24, pri projektoj lingvoreforma kaj religia. Kun komentario de G. Waringhien kaj bibliografio de R. Hauptenthal.

Noveloj Lusin (1881-1936) Div. tradukintoj (2a eld., 1974). 488p. Ilus. 22cm. Bind. 8,10 gld. Ĉi tiu dua eldono de la noveloj de la elstara ĉina verkisto enhavas ĉiujn liajn 33 novelojn, kun biografiaj notoj pri la aŭtoro.

Panampe kaj Penampe (1974) T. Mukai. 6p. Ilus. 27cm. 2,40 gld. Popola rakonto el la nordjapana insulo Hokkajdo.

Participa problemo en la Akademio, La (1973) E. Vilborg. 138p. 21cm. Broŝ. 5,10 gld. Dokumentaro kompilita el la vidpunkto de la "ata"-skolo.

Poŝtkarto kun foto de Zamenhof 0,18 gld. Normala poŝtkarto kun bildo de Zamenhof sur la adresflanko.

Problema de la comunicación en el mundo, El (1974) Informfolio. 0,06 gld.

Skizoj pri la usona novkoloniismo, 3a parto; La usona novkoloniismo en sudorienta Azio (1973) 217p. 19cm. Broŝ. 1,80 gld.

Soveta Armenio (1973) G. Sevak. Tradukis G. Lazruni. 30p. Ilus. 20cm. Broŝ. 0,90 gld.

Szegedi munkásesperantista mozgalom létrejötte és megerősödése (1914-1925) (1973) A. Rátkai. 19p. 24cm. Broŝ. 1,20 gld. Hungarlingva artikolo pri la frua historio de la laborista Esperanto-movado en Szeged.

Utaaro de Takuboku Isikawa takuboku (1886-1912). El la japana trad. Miyamoto masao (1974). 118p. 17x17 cm. Broŝ. 6,90 gld. Utaoj de aŭtoro, kiun la tradukinto nomas "la japana Heine".

Verda robo (1974) J.H. Rosbach. 93p. 21cm. Broŝ. 12,— gld. Novelaro.

Vizio de la monaĥejo en Kioto, La (1973) Hiuga Y. (1922 -). El la japana trad. Nisida R. 13p. 26cm. Broŝ. 2,40 gld. Pri la inspiro kaj celoj de nova budhana monaĥejo en Kioto.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

Antaŭ 50 jaroj

KLARA LINGVO

La kvina ĝenerala kunsido de la Ligo de Nacioj alprenis la 20 septembro la jenan rezolucion unuanime:

"La ĝenerala kunsido de la Ligo de Nacioj rekomendas, ke la ŝtatoj, membroj de la Ligo, konsentu al Esperanto la traktadon kaj tarifojn de lingvo 'klara' en telegrafaj kaj radio-telegrafaj interrilatoj, kiel praktika helpa lingvo de la internaciaj interkomunikoj flanke de la naciaj lingvoj uzataj, kaj atentigas je tiu celo la organizon pri komunikado kaj transito."

ANKAŬ LASTMOMENTE

Lasthore! La Svisa Esperanta Societo en sia jarkunveno en Biel, 28 aŭgusto 1924, invitis la XVIIan Kongreson al Genève, 3 aŭgusto 1925, ĉar neniuj alia nacia societo invitis.

(Nu, precize kiel post 50 jaroj en Hamburgo, kiam kopenhaganoj invitis la 60an UK, ĉar neniuj alia...).

DU TIAMAJ JUNULOJ

Laŭ la nova aranĝo de l'Akademia organizo la "Sekcio de Konkursoj kaj Premioj" havas nun apartan komisionon; ĝi prenis sur sin, jam tiun ĉi jaron prezenti al la aprobo de la Akademio kelkajn verkojn, kiuj meritas oficialan atentigon kaj rekomendon.

Post ekzameno de la prezentitaj verkoj, la Akademio decidis aljuĝi tiun honoran rekompencan por 1924 al la du jenaj:

1. "Preter la Vivo", originalaj poemoj de Julio Baghy;
2. "Johano la Brava", de Petöfi, traduko de K. de Kalocsay.

Per tiu honorigo la Akademio deziras ne nur publikigisian admiron al la fortaj versoj de Baghy kaj al la majstra stilo de Kalocsay en la du cititaj verkoj, ĝi ankaŭ volis esprimi sian ĝeneralan dankon al tiuj du rimarkindaj uzantoj de nia lingvo, kiuj ĝin riĉigis per tre valoraj verkoj.

Revuo *Esperanto*
Oktobro 1924

Kubo

• Almenaŭ laŭ du neoficialaj leteroj, kiuj atingis nin dum septembro, komence de tiu monato en Havano fondiĝis landa Esperanto-organizaĵo, kiu nomiĝas Kuba Esperanto-Asocio.

Svislando

• Tiĉina Esperanto-Ligo organizas, en Lugano la 16an kaj la 17an de novembro 1974, Kulturen semajnfino, kies ĉeftemo estas "Naturesciencoj: kiom signifaj por nia hodiaŭa vivo?". Inter la prelegontoj troviĝos d-roj G. Azzi, N. Minnaja kaj A. Braun. Samtempe, lingvokursojn gvidos s-roj C. Piron kaj C. Gacond. Pri detaloj informas: d-ro T. Carlevaro, Casa Cicognana, CH-6883 Novazzano, Svislando.

• Por la jarŝanĝaj tagoj, inter la 26a de decembro ĉ.j. kaj la 5a de januaro 1975, Kultura Centro Esperantista (Miéville 133, CH-2314 La Sagne, Svislando) anoncas skiferion en Adelboden. Partopreno en ĉi tiu populara vintra aranĝo, kiu okazas la 18an fojon, kostas inter 240, — kaj 270, — svisajn frankojn.

Kanado

• Kanada Esperanto-Asocio antaŭ nelonge eldonis broŝuron "Membrolisto 1974", kiu aspektas kiel miniatūra jarlibro, kun amaso da utilaj informoj kaj adresoj de pli ol 200 esperantistoj en la lando. Ion similan faris ankaŭ la Dana Esperanto-Asocio komence de ĉi tiu jaro.

Sovet-Unio

• En pitoreska loko de la regiono de Ivanovo (nordoriente de Moskvo), sur la bordo de la rivero Oka,

fine de julio ĉ.j., SEJM (Sovetia Esperantista Junulara Movado) okazigis la 8an konferencon de sia konsilantaro kaj la 16an Sovetian Esperantistan Junularan Tendaron (SEJT-16). La tendaron partoprenis 217 gejunuloj el Ukraino, baltaj respublikoj, Kaŭkazio, okcidenta Siberio, Baŝkirio kaj aliaj partoj de la vasta lando. La programo de la 10-taga tendaro enhavis paroligajn kaj tradukistan kursojn, koncertojn, prelegojn, konkursojn kaj multajn aliajn erojn.

FR Germanio

• Ludwig Pickel, la entreprenema eldonisto el Nurenbergo, ĵus lanĉis la fondiĝon de Internacia rondo "Amikoj de la Esperanta literaturo kaj kulturo". Temas pri iniciato, kies celo estas krei ion similan al la t.n. "librokluboj", kiuj ekzistas en multaj landoj kaj ludas gravan rolon en la popularigo de la libro kaj kulturo ĝenerale. Tiuj, kiuj aliĝos al la rondo de la eldonanto de "Pilo-Press", transprenos la devon aĉeti almenaŭ unu Esperanto-libron en la daŭro de tri monatoj.

Francio

• Post la reveno el Hamburgo, kie li ekŝiĝis el la Komitato de UEA, s-ro Jean Thierry proponis al la Konsilantaro de Unuiĝo Franca por Esperanto, ke la franca landa asocio ekŝiĝu el UEA. Laŭ informo ricevita de la nova prezidanto de UFE, s-ro Jean Guillaume, la rezultoj de la tiurilata voĉdono montriĝis nefavoraj por la propono de s-ro Thierry, kiu, kune kun s-roj Albault kaj Bourdeaux, rezignis pri iuj siaj funkcioj en UFE.

Islando

• Survoje al Usono, la nova prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, pasigis tri tagojn en Islando. La plej granda ĵurnalo tie, *Morgunblaðid*, havis kun li longan intervjuon, kiu aperis la 27an de aŭgusto sub la titolo: "Esperanto — solvo de la lingvo-kaoso?". En la intervjuo estis detale kaj objektivaj pritraktita la temo: la lingvaj problemoj en la hodiaŭa mondo kaj Esperanto kiel ĝia solvo. Krome estis informite pri la nuna stato de la Esperanto-movado, pri la historio de UEA, pri la UK en Hamburgo, pri literaturo en Esperanto kaj pri diversaj aliaj aferoj. Estis menciita ankaŭ eventuala okazo de UK en Reykjavik en ne tro fora estonteco.

Tradukoj

• "Het Kinderras" estas la nederlandlingva titolo de la traduko de *Infana raso* de W. Auld. La ĉefverkon de la postmilita Esperanto-literaturo tradukis d-ro W.A. Verloren van Themaat kaj la eldonejo Xeno en Groningen jam akceptas antaŭmendojn de la eldonota volumo (12,— gld.).

Premioj

• En la ĉi-jara konkurso de la itala literatura rondo "La Patrolo", premiojn gajnis Lina Gabrielli, Aldo de Giorgi kaj Julius Balbin, en la branĉo originala poezio, dum la premioj por originala prozo estis aljuĝitaj al Alfredo Perricone Pirandello, Nevena Nedelĉeva kaj Penka Ruseva Batoeva.



Hungario: Pri la jubilea 25a Hungarlanda Esperanto-Kongreso, kiu okazis komence de la pasinta somero, nin ne atingis raporto, sed alvenis ĉi tiu impona foto, kiu montras la Prezidentaron dum la inaŭguro de la Kongreso.

Revuoj

- *Hungara Vivo*, la bela kaj riĉenhava dumonata revuo, kiu jam 14 jarojn aperas en Budapeŝto, ĉiam pli ofte orientiĝas al specialigitaj numeroj, dediĉitaj al unuopaj temoj kaj personoj. Post la unuaj tri ĉi-jaraj numeroj, en kiuj estis traktitaj Esperanta prozo, hungara turismo kaj Esperanta poezio, ĝis la fino de 1974 oni planas numerojn pri hungara ekonomio, originala dramo en Esperanto kaj hungara scienco. En antaŭaj jaroj aperis specialaj numeroj pri: Kalocsay, *Literatura Mondo*, Petöfi, Illyés kaj Szathmári. La revuo estas abonebla ankaŭ pere de la Libroservo de UEA: 13,50 (por Nederlando 14,04) gld. jare.

- *El Popola Ĉinio*, la monata ilustrita revuo, eldonata de Ĉina-Esperanto-Ligo, en sia aŭgusta numero dediĉis tri plenajn paĝojn al la vizito de Japana Esperanto-delegacio al Ĉinio, en aprilo ĉi-jare (v. nian revuon, julio-aŭgusto 1974, p. 127).

Literaturo

- La 3an de septembro, la islanda ĵurnalo *Morgunblaðid* aperigis ampleksan artikolon de I. Gislason, lektoro ĉe la Universitato de Reykjavik, sub la titolo "Baldur Ragnarsson — poeto en Esperanto". La artikolo estas ĝenerala skizo pri la poezia verkado de Ragnarsson en la Internacia Lingvo kaj ĝi interalie citas recenzojn pri lia nova poemaro *Esploroj*.

Fervojistoj

- La 16a Internacia Fervojista Esperanto Skisemajno okazos inter la 15a kaj la 22a de februaro 1975, en Plan Val Gardena, apud Bolzano en Italio. La aranĝon organizas Itala Fervojista Esperanto-Asocio, via Donato Creti 61, I-40128 Bologna, - Italio.


Filatelo

- Okaze de la Internacia ekspozicio de poŝtmarkoj "Opava 74", okazinta en la samnoma urbo en Ĉeĥoslovakio, fine de aŭgusto kaj komence de septembro ĉ.j., membroj de la Esperanto-sekcio de la Federacio de ĉeĥoslovakaj filatelistoj gajnis entute 5 altnivelajn premiojn. La kolektoj de Esperantaj poŝtmarkoj, apartenantaj al s-roj Bartošik, Burmeister, Hasala, Váňa kaj Jakubec, estis ekspoziciitaj en aparta salono. En la ekspozicia katalogo du artikoloj es-

tis dediĉitaj al Esperanto (ambaŭ de V. Hasala) kaj la Internacia Lingvo troviĝis ankaŭ sur la premiaj diplomoj de la ekspozicio en Opava.


Ekumenismo

- Pro redakcia pretervido okazis, ke ni en la septembra numero tute ne menciis la Ekumenan Diservon dum la 59a UK. Kun 600 ĉeestintoj, 9 katolikaj kaj protestantaj pastroj kaj granda koruso, la Diservo estis unu el la plej imponaj aranĝoj tie.



Neergaard

- Unu el la vicprezidantoj de la Akademio de Esperanto, d-ro Poul Neergaard el Kopenhago, dum ok-



tobro ĉi-jare festos la 50an datrevenon de sia aktiviĝo en la Esperantomovado. La mondkonata sciencisto ankaŭ en la Movado ĉefe distingiĝis kiel unu el la plej seriozaj kontribuintoj al la faka literaturo en la Internacia Lingvo.

Aŝvinikumar

- D-ro Aŝvinikumar, tiu dua stelo (la unua estis L. Ŝingho, la tria P. Daŝgupto) sur la movada firmamento de Hindio, anoncas sin el Paderborn, FR Germanio, kie li posteniĝis en la Instituto por cibernatika pedagogio, estrata de prof. d-ro Helmar Frank. Aŝvinikumar estas matematikisto, kiu antaŭ kelko da jaroj doktoriĝis en la Universitato de Amsterdam, verkinte sian disertacion en la Internacia Lingvo, kun hindia kaj angla resumo. En Paderborn li laboras en la kadro de la Esplorcentro por objektivigitaj instru-kaj lernprocedoj.

Behrmann

- La aŭtoro de la internacie populara lernmetodo *Esperanto progra-*

Donacoj

- Temas pri 25 000 usonaj dolaroj, kiujn la konata tenisisto Bobby Riggs gajnis vete kaj donacis al iu "Lingva Organizaĵo Voĉdonanta Esperanton", kiel ni tradukis la anglalingvan nomon "Language Organization Voicing Esperanto", farante tiun akrobataĵon por konservi la mallongigon LOVE. Ni aŭdis amason da detaloj pri la donaco, sed, ne povante plene orientiĝi, ni lasas ilin por ebla posta raporto, foje.

Persone

mita, Hermann Behrmann el FRG, komence de aŭgusto veturis al Budapeŝto kaj vizitis la faman poeton Kalocsay. Post malsano komence de la ĉi-jara somero, d-ro Kalocsay denove fartas bone kaj aktivas super nepublikigitaj manuskriptoj.

Bormann

- Post la partopreno en la feria aranĝo "Ora pola aŭtuno" en Międzygórze, d-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA kaj prezidanto de GEA, estis akceptita ĉe la direktoro de la eksterlanda fako de Pola Radio, Witold Skrapalak. Dum la longa interparolo, kiun ĉeestis ankaŭ la estro de la Esperanto-redakcio, Jan Klimek, oni ĉefe traktis la rezultojn de la 59a UK kaj la agadon de la Esperanta fako de Pola Radio.

Berger

- Josef F. Berger (Kolonjo, FRG), la 7an de oktobro ĉi-jare festos sian 80an datrevenon. Dum sia riĉa kaj longa movada kariero (li lernis Esperanton en la jaro 1908), s-ro Berger, kiu estas honora membro de Germana Esperanto-Asocio, estis redaktoro de *Heroldo de Esperanto*, *Germana Esperanto-Revuo*, *Okcidentgermana Revuo*, tradukis plurajn librojn, verkis la popularan legolibron *Niko kaj Nina* kaj — kio estas aparte substrekinda — ankoraŭ ĉiam restas aktiva.

Tvarožek

- La gvidanto de la muzika ensemblo Kvarteto Esperanto, Eduard Tvarožek el Trenčín (Ĉeĥoslovakio), kiu ofte kunlaboras ankaŭ en nia revuo, laboras super slovaka traduko de romano de la aŭstralia nobelpremiito Patrick White.

N-ro 481, 1974 - 07 - 31

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ:

BRIT: Arthur Jackson, Christopher Long. FRG: R. H. Hegen. KAN: Dorothy C. Henderson. NED: A.J. Bout.

MEMBROJ SUBTENANTOJ 1974

BRAZ: 221 E. Pereira Nunes. BRIT: 222 B. Spiller. FRG: 223 L. Jolliet. NORV: 224 Kap. R. Bugge-Paulsen. SVED: 225 Åke Ericson, 226 Hans Nordebäck, 227 Curt Olsson.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1974-12-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomigo fariĝos valida.

BRAZ: Lazarus Brieger, D Rio de Janeiro; Braz Cosenza, FD Rio de Janeiro. BRIT: John Coogans, D kaj FD Bishopton; C. C. Preston, VD Bristol; Albert Goodheir, VD kaj FD Glasgow; D.M. Worcester, VD kaj FD London; Frances Slack, D kaj FD Lytham St. Annes; Neil Salvesen, VD Manchester; Alfred George Tucker, FD Nottingham; M. Boulton, D kaj FD Oxford; Leslie Richard Stiling, D Paignton; P.A. Danning, D kaj FD Richmond upon Thames; Colin Quayle, D kaj FD Wilmslow. DANL: R. Lønblad, D Roslev. FRANC: André Fabre, D kaj FD Billère. FRG: H.D. Hartig, D Bremen. HIND: Bal Ram Tulsyani, D New Delhi. HISP: L.A. Ramírez Teruel, FD Alicante. INDON: Tjong Hie Liem, FD Semarang. ISR: Josef Šemer, JD Tel-Aviv. JUG: B. Miličević, FD Novi Sad. MALAG.RESP: E. Raveloson, FD Tananarive. NED: Elly Kervers-van Tholen, D Wijlre. NORV: Ludvig Anjer, D Oslo; K. Myhr, VD Oslo.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri jenaj delegitoj en Jarlibro 1974, Unua Parto:

ARG: Firmat. AŬSTRAL: Box Hill. BELG: Antwerpen, FD (sociaj aferoj); Bruselo, FD (religio). BRAZ: Caxambu; Rio de Janeiro, D. BRIT: Cirencester; Prestwich; Sheffield, VD.

FRANCIO: Anzin-St-Aubin; Bastia; Crest, VD kaj FD (instruado kaj turismo); Fécamp; Nonancourt. ITAL: Albenga; Torino, D kaj FD (aŭtomobiloj), FD (interpretado). JUG: Titograd, FD (turismo). NED: Dubbeldam. NORV: Oslo, D kaj VD.

KOREKTOJ JARLIBRO 1974

BELG: Dendermonde: forstreku FD (turismo) s-ino Agnes Coene-Geelen. Deurne: aldonu FD (turismo) s-ino Agnes Coene-Geelen. BRIT: Crosby: aldonu FD (skoltismo): la D. ĈEĤO-SLOVAKIO: Nitra: forstreku FD (instruado); FD (lingvoj). Nižkov: aldonu FD (instruado): la D; FD (lingvoj): la D. POLL: Łódź: aldonu FD (juro): la VD.

DONACOJ 1974 (Gld.)

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 3,70. Sumo ĝisnuna 11,16. FONDAĴO CANUTO: Institucio Hodler '68: 2 000,—. FR Germanio: F. Liebl 40,—. Nederlando: Edwin Burg 5,—. Usono: T.E. Boyd 8,—. Sumo ĝisnuna 2 449, 15.

ĜENERALA KASO: Britio: H. D. Palmer 3,46. FR Germanio: G. Jungkamp 16,58. Nederlando: B.R. Beekhuysen 4,08; M. Meijwes 5,—. Usono: H.L. Ford 6,48. Sumo ĝisnuna 1 970, 78.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

N-ro 482, 1974 - 08 - 31

MEMBROJ SUBTENANTOJ 1974

BRAZ: 228 H. Foscolo. KAN: 229 E.J. Napier. US: 230 L.H. Maury.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1974-12-15 neniu membro protestos la nomigo fariĝos valida.

ĈEĤOSL: J. Petrlík, D Cheb. DANL: Hardy Skougaard, D kaj FD Vedde. FRG: U. Brandenburg, JD Münster. HUNG: B. Mészáros, FD Debrecen; Maria Vikar, D kaj FD Mohács.

KUBO: F. Paredes, FD Habana. US: C.R.L. Power, VD San Mateo kaj FD San Francisco. ZAIR: Nkiama Nzemba-Yi-Paku, FD Kinshasa.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en Jarlibro 1974, Unua Parto.

BRAZ: Cruzeiro do Sul; Ibiraci; Recife, VD kaj FD (komerco); Rio de Janeiro, FD (medicino), FD (turismo); São Paulo, FD (vegetarismo). BRIT: Bexhill-on-Sea; Nelson. BULG: Peŝtera; Pleven. ĈEĤOSL: Bučovice; Lanškroun, D; Prešov; Příbor. ĈIL: Valdivia. DANL: Nykøbing F., D. FINN: Alavus; Harjavalta; Korso; Masku; Oulu, JD; Turku, FD (turismo). FRANC: Cagnes-sur-Mer; Cormeray; Cornimont; Mouchin; Paris, FD (turismo). GDR: Karl-Marx Stadt. FRG: Grafenau; München, D kaj FD (tekniko). HISP: Jaén. ISR: Tel-Aviv, FD (ŝako). ITAL: Campobasso, Carrara; Firenze, FD (medicino); Massa, FD (mineralogio); Napoli, JD, FD (stenografio); Trieste, FD (astro-kirozofio), FD (medicino). JAP: Nagoya, FD (aeronaŭtiko) kaj (radio amatora). JUG: Beograd, FD (lingvoj). KOR: Milyang, Taegu, FD (juro). MALIO: Bamako. MONAKO: Monte Carlo, FD (turismo). NED: Groningen, VD Krommenie. NORV: Trondheim, FD (lingvoj). N-Z: Whangarei. POLL: Lublin, FD (medicino); Radom; Stalowa Wola; Starachowice; Warszawa, FD (arkitekturo), FD (ekonomio). SOV: Ĥarkov, FD (juro); Jaroslavl; Jūrmala; Moskva, VD kaj FD (fiziologio) kaj (medicino), FD (geografio); Tula; Viljandi, FD (literaturo). SUD-AFR: Uitenhage. US: Houston, FD (medicino); Minnewaukan; St Petersburg, FD (instruado).

DONACOJ 1974 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Svedio: E. Carlén 1016,50. Sumo ĝisnuna 2127,22.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: Germain Pirlot 4,20; Francio: Yves Fromentoux 25,—. Sumo ĝisnuna 40,36.

FONDAĴO CANUTO: Anonime 20,—. Italio: Carolina Minnaja 50,—. Nederlando: Edwin Burg 2,50. Sumo ĝisnuna 2521,65.

FONDAJO TEATRA TRUPO: Italio: Carolina Minnaja 50,—. Sumo ĝisnuna 50,—.

ĜENERALA KASO: Anonime 5,01. Danlando: E.J. Frost 10,32. Nederlando: J.v.d. Hoeven 2,82; J. Niemans 10,—. Portugalio: Manuel de Freitas 30,—. Svedio: S. Möllestad 11,22. Sumo ĝisnuna 2040,15.

PATRONA MEMBRO A DE TEJO 1974: 19. Carolina Minnaja, Italio. Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

POŝTISTA KUNLABORO KONTRAKTITA

La 30an de junio 1974, per skriba voĉdono de la Komitato de UEA, estis aprobita kontrakto pri kunlaboro kun Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA). IPTEA havas ĉ. 600 membrojn. Fondita en 1966, ĝi jam establis landajn sekciojn en Bulgario, Finnlando, Svedio kaj Francio kaj havas regule aperantan organon *Interligilo* (kvaronjara). Adreso: Poŝtenska kutija 25, Sofia-C, Bulgario.

LA ASOCIO DE JURISTOJ EKSIGIS EL UEA

Per letero de 1974 09 14, Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) eksigis el UEA kiel aliĝinta faka asocio, konforme al decido de sia ĉefkunveno en Hamburgo, 1974 07 30.



Vicente Soler Sanchiz, Av. Jose Antonio 58, Valencia-5, Hispanujo, 8-jara, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn kaj aliajn aferojn kun geinfanoj el la tuta mondo.

Kio estas tutmondismo? Estas la agado de la mondĉivitanoj, kiuj volas forigi de la mondo: internaciajn

Kotiztabelo por 1975

Valuto	MJ	MA	MS	J-MJ	J-MA	K-to	Pat.A
		MA-K			SA		
£ brita	3,60	7,20	21,60	1,80	5,40	1,90	3,80
\$aŭs/NZ/rand.	7,00	14,00	42,00	3,50	10,50	3,70	7,40
\$US/kanada	9,50	19,00	57,00	4,75	14,25	5,00	10,00
guldeno/DM	25	50	150	12,50	37,50*	13*	26,00
franko svisa	28	56	168	14	42	15	30
marko finna	34	68	204	17	51	18	36
ĉisr./bs.venez.	38	76	228	19	57	20	40
krono sveda	40	80	240	20	60	21	42
int.resp.kup.	42	84	252	21	63	22	44
franko franca	44	88	264	22	66	23	46
kruzejro	48	96	288	24	72	25	50
krono norvega	50	100	300	25	75	26	52
krono dana	58	116	348	29	87	31	62
peso argentina	108	216	648	54	162	57	114
dinaro	130	260	780	65	195	68	136
krono ĉeĥosl.	150	300	900	75	225	80	160
ŝilingo aŭstra	180	360	1080	90	270	95	190
eskudo port.	220	440	1320	110	330	115	230
draĥmo	260	520	1560	130	390	140	280
franko belga	360	720	2160	180	540	190	380
solo perua	480	960	2880	240	720	250	500
peseto hispana	520	1040	3120	260	780	270	540
eno japana	2700	5400	16200	1350	4050	1400	2800
piastro vjetn.	3000	6000	18000	1500	4500	1600	3200
lirio itala	5200	10400	31200	2600	7800	2700	5400

MJ = Membro kun Jarlibro. MA = Membro-Abonanto. MA-K = Membro-Abonanto kun *Kontakto*. MS = Membro-Subtenanto (membro de "Societo Zamenhof"). J-MJ = Juna Membro kun Jarlibro. J-MA = Juna Membro-Abonanto. SA = Simpla Abonanto de *Esperanto*. K-to = Abonanto de *Kontakto* (sen membreco de TEJO). Pat.A = Patrono 'A' de TEJO.

* Por Nederlando aldoniĝas al la prezoj de simplaj abonoj (sen membreco) de la revuoj *Esperanto* kaj *Kontakto* la enlanda imposto 4%. La prezoj por enloĝantoj de Nederlando estas do respektive 39,00 kaj 13,52 guldenoj.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

militojn, malsaton, socian maljuston, subpremon. Por atingi tiujn celojn, ili proponas krei supernaciajn aŭtoritatojn, kapablaj solvi mondajn problemojn. Skribu al: Volpeliere, 10, rue Servie, F-30000 Nimes, Francujo.

Nia delegito en Bagdado, Husen Mohammed Al-Amili, ĵus fariĝis dumviva membro, ĉar li kredas, ke la Internacia Lingvo estas ne nur lingva movado sed ankaŭ movado de bonvolo kaj pacemo, kaj tio, li kredas, indas dumvivan personan lukton.


PLUMAMIKOJ ALILANDAJ! Individua prezentservo! Tra la tuta mondo! Ilustritaj internaciaj plumamikecrevuoj! Plilarĝigu viajn horizontojn! Detaloj senpagaj! Skribu

hodiaŭ: Five Continents Company Ltd., Waitakere, Nov-Zelando.

Ĉu vi interesiĝas pri la dancarto? Se jes, volonte korespondos kun vi s-ino Saranath, 'Sai Saranath', 103, Borewell Road, Whitefield - PIN 562 136, Bangalore Dist. Hindunio.

MERLO SUR MENHIRO, poemaro de Albert Goodheir, kun antaŭparolo de Marjorie Boulton. Eldonis Glasgova Esp. Soc.: S-ro J. Casey, 9 Flora Gardens, Bishopbriggs, Glasgow G64 1DS, Skotlando. (£ 0.70).

Ĵurnalisto scivolas, ĉu ekzistas parolantoj de Esperanto. Skribu al li: s-ro Adema, "Arnhemse Courant", v. Oldenbarneveldstr. 115, Arnhem, Nederlando.



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1973, Dua Parto, p.157. Mallongi-
goj: I = informoj; P = parolado; K = kurso.

Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 31.45 m (9540 kHz). I.P. Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Varsovio, 41.99 m (7145 kHz), 31.45 m (9540 kHz), 31.01 m (9675 kHz). I.P.
21.30-22.00 Varsovio, 200m (1502 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48,90 m (6135 kHz). I.P.

Dimanĉe

05.45-05.55 Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 41.38m (7250 kHz), 13.83 m (21705 kHz). I.P. Radio Wien, Esperanto-elsendo, Argentinierstr. 30a, A-1041 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.
08.30-08.55 Sofio, 49.42 m (6070 kHz). P. Radio Sofia, Bulgario.
10.30-11.00 Muritiba, 190m (1580 kHz). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
11.00-11.30 Pekino, 47 m, 40 m, 30 m. I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinio.
12.30-13.00 Pekino, 30 m, 25 m, 19 m. I.
20.00-20.20 Romo, 50.08 m (5990 kHz), 41.24 m (7275 kHz), 30.90 m (9710 kHz). P. Radio Roma, Esperanto-fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.
20.05-20.30 Sofio, 50.61 m (5928 kHz). P.

Lunde

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, S.P., Brazilo.
12.20-12.30 Berno, 75.28 m (3985 kHz), 48.66 m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz), 19.60 m (15305 kHz), 19.44 m (15430 kHz), 16,86 m (17795 kHz), 13.94 m (21520 kHz). P. (d-ro A. Baur), Svisa Radio, SOC, CH-3000 Bern 16, Svislando.
12.30-12.45 Gdańsk, 66.29 MHz

(mod. frekv.). Ripeto de la sabata programo el Varsovio unu fojon en la monato.

Marde

16.40-16.55 Bratislavo, 68.84 MHz, (mod. frekv.) kaj aliaj stacioj 67.94 MHz, 69.20 MHz, 69.50 MHz, 69.68 MHz. K. Radio Bratislava, Leninplaco 13a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakio.

Merkrede

12.20-12.30 Berno, kiel lunde (s-ro Gacond).
12.30-12.45 Vieno, 203 m (1475 kHz). P. (ĉiun kvaran sinsekvan merkredon).
20.45-21.00 Sabadell, 203 m (1475 kHz), 89.1 MHz (mod. frekv.). I.K. Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanio.

Ĵaŭde

16.25-16.40 Bratislavo, kiel marde.
21.45-21.55 Berno, 75.28 m (3985 kHz), 48.66 m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz), 25,60 m (11720 kHz), 25.27 m (11870 kHz), 19.60 m (15305 kHz), 19.44 m (15430 kHz). P. (d-ro Baur).

Vendrede

18.00-18.30 Clermont-Ferrand, 90.4 MHz (mod. frekv.). K. Centre de Téléenseignement de la Faculté des Lettres, 29 bd. Gergovia, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.
20.00-20.30 Pekino, 43 m, 33 m, 31 m, 25 m. I.
23.05-23.20 Zagrebo, 264 m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Jugoslavio.

Sabate

00.05-00.20 Varsovio, 1321 m (227 kHz). P. Programo preparita de Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando; ĝi okazas unu fojon ĉiumonate dum muzika programo kaj povas esti prokrastita ĝis 00.30.
11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
16.45-16.55 Vieno, 48.74 m (6155

kHz), 16.87 m (17780 kHz). I.P.
20.00-20.30 Pekino, kiel vendrede.
21.45-21.55 Berno, kiel ĵaŭde (s-ro Gacond).
22.00-22.15 Valencio, 358 m (836 kHz). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanio.

RADIO VARSOVIO krom la ĉi-supre anoncita ĉiutaga programo prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de 21.00 h ĝis 21.30 h per ondoj 49 m, 41 m, 31 m; 2) dum la svedlingva programo marde de 15.00 h ĝis 15.30 h per ondoj 200 m, 49 m; 3) dum la danlingva programo dimanĉe de 20.00 h ĝis 20.30 h per ondoj 49 m, 41 m. La anguletoj estas kelkminutaj kaj pri-traktas ĉefe Esperanto-temojn.

ĜENERALA AŬDEBLECO

a) stacioj nur loka aŭdeblaj (nur en la lando mem, kelkaj nur en la urboj): Bratislavo (ankaŭ en eksterlandlimaj regionoj), Clermont-Ferrand, Gdańsk (M.F.), Muritiba, Sabadell;

b) stacioj aŭdeblaj en Eŭropo kaj mediteraneaj landoj: Berno (75.28 m, 48.66 m, 31.46 m), Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate), Romo, Sofio, Valencio (en suda Eŭropo), Varsovio, Vieno (203 m, 48.74 m), Zagrebo;

c) stacioj aŭdeblaj en Azio kaj Ameriko: Pekino (dimanĉe kaj sabate je 11.00 kaj 12.30 GMT), Sorocaba (en Brazilo kaj najbaraj landoj), Vieno (41.38 m, 16.87 m, 13.82 m) en sudorienta Azio;

ĉ) stacio aŭdebla en Afriko: Berno (25.60 m, 25.27 m, 19.60 m, 19.44 m, 16.86 m, 13.94 m).

Tio estas nur ĝenerala skizo, variigbla laŭ modelo de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, lokaj cirkonstancoj diversspecaj.

EĈ SKRIBA PLENDU ESTAS SUBTENO AL LA REDAKCIO DE RADIO-PROGRAMO!

pasporta servo

fariĝu gastiganto por 1975
informojn petu ĉe: Cash, 72 rue de Rennes,
F-75006 PARIS, Francio

bezonas vin



ESPERANTO, LINGVO MATEMATIKE PRECIZA.

Legu "Kompleta Lernolibro de Regula
Esperanto", de L. Mimó.
Prezo 17,50 guldenoj.

Anonco en esperanto

atingas pli da legantoj en pli da landoj,
ol anonco en iu ajn alia Esperanta revuo.

Tarifo:

anonco tutpaĝa = 375,— gld.

anonco duonpaĝa = 200,— gld.

anonco kvaronpaĝa = 110,— gld.

anonco okonpaĝa = 65,— gld.

anonco deksekonpaĝa = 40,— gld.

Rabato por senŝanĝa ripeto: 20%.

LA ABONO DE ALIAJ ELDONAĴOJ
ALTIĜAS PRO INFLACIO,
KAJ LA ABONO DE

Kontakto

ALTIĜIS PRO LA VALORO
DE LA REVUO.

ĈIUJ REVUOJ HAVAS KOVRILON,

Kontakto

HAVAS ANKAŬ MALKOVRILON.

Eldonas: TEJO, Nwe Binnenweg 176,
Rotterdam 3002, Nederlando.

Abonprezo: 13,— (por Nederlando
13,52) guldenoj, inkluzive la imposton
kaj la aktualecon de la artikoloj.

VERKO, KIUN DEVUS STUDI ĈIU AKTIVA MEMBRO:

POR PLI EFIKA INFORMADO

artikolserio de Ivo Lapenna unue publikigita en la revuo *Esperanto*,
eldonita de la Informa Fakto de UEA kiel 20-paĝa bele ilustrita
broŝuro plenŝtopita per praktikaj konsiloj ĉerpitaj el la multjaraj
spertoj de la aŭtoro sur la kampo de informado.

Prezo: 2,25 (por Nederlando 2,34) guldenoj, plus sendokostoj 10%.
Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando. Rabato por kvantaj mendoj.



ĴUS APERIS la dua
eldono de la jam
(fi)fama anekdotaro de
Louis Beaucaire

**KRUKO
KAJ BANIKO
EL BERVALO.**

Kun la subtitolo
"Maldecaj anekdotoj
por neprudaj legantoj",
tiu vigle ilustrita
originala ridincitilo tiel
furoris tra la mondo, ke la unua eldono
el 1970 jam post nuraj ses monatoj estis
havebla nur prunte aŭ ŝtele. Simila sorto
verŝajne atendas ankaŭ la duan, korektitan
eldonon. La prezo, malgraŭ la galopa
inflacio, restis pli modesta ol la enhavo.

Amplekso: 143p. + 13 bildopaĝoj.
Formato: DIN A5. Broŝurita kaj
plastumita. Prezo: 16,- gld. (por
Nederlando, inkluzive de imposto:
16,64 gld.) + sendokostoj 10%.

*Kruko kaj Baniko
el Bervalo*



**La legolibro, kiun ni plej
bezonis**



Novspeca
legolibro en-
havanta 20
dialogojn kun
2000 konversa-
ciaj frazoj, parol-
turnoj, demandoj
kaj respondoj kaj
kun 20 tutpaĝaj
humuraj ilustraĵoj.
La tekstoj estas laŭ-
grade aranĝitaj.



Verkita en
simpla stilo
por faciligi al
novaj lern-
antoj paroli
la Inter-
nacion
Lingvon

141 pj.
Poŝform-
ata (22 x
12 cm)

Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris: Arfoll. Eldonis:
Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) guldenoj, plus
sendokostoj 10%. Rabato revendista: 33,3% ĉe
mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnen-
weg 176, Rotterdam-3002, Nederlando




eldonplanoj...?

NI POVAS HELPI VIN:

RAPIDE, AKURATE KAJ FAVORPREZE !

- lernolibroj
- vortaroj
- reklamiloj
- broŝuroj
- katalogoj



- informiloj ■
- prospektoj ■
- leterpaperoj ■
- kovertoj ■
- vizitkartoj ■

Grafika Studio Nevan

West Sidelinge 198, Rotterdam 3008, Nederlando



GSN PROJEKTOJ - KOMPOSTADO - GRAFIKAJ ARANĜOJ - PRESADO - BINDLABOROJ